

93-a jaro • n-ro 1124 (4) • **aprilo 2000**

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Emocioj en Barato kaj Nepalo



Invitas Rondo Familia




C  tutmondismo sen demokratia dialogo?



Kun Ben Jelloun pri rasismo

Vi trovos

- 61 **Malferme**
Ne per enigmaj aludoj
Osmo Buller

- 62 **EN MANSARDO DE IDEA MONDCIVITANO**
Intervjuo kun
Tahar Ben Jelloun

La samlandano
Tahar Ben Jelloun, trad. István Ertl

- 64 **Esperantaj familioj**
Ponto inter verdaj generacioj
Amri Wandel

- 65 **Tutmondiĝo kaj la arabaj landoj**
Ĝardeno sur alta grundo
Renato Corsetti

- 66 **LA MEMBRARO DE UEA EN 1999**

- 67 **Lingvopolitiko**
Kunzorgi pri lingva plureco

Movada strategio

Por laŭpaŝa oficialigo

Oszkár Princz

- 68 **Azio**
Esperanto venis al barata vilaĝo
Atilio Orellana Rojas
Nepalo ne-pala, tro-pika
Sakari Kauppinen

- 69 **Navige tra TTT-paĝoj**

- 70 **Reagoj**

- 71 **Forumo**
E-o en la tutmondisma debato
Jorge Luis Gutiérrez

- 72 **Libroj**
La pasintjara ducento
Aleksander Korĵenkov
Laboro grava... senfina
Humphrey Tonkin

- 73 **Recenzoj**
Julian Modest pri
Antologio de la serba poezio
Till-Dietrich Dahlenburg pri
Plansprache und Phraseologie
Aleksandr D. Duliĉenko pri
Menade bal pŭki bal

- 75 **Laste aperis**

Kaj plue...

- 76 **Fake - Loke**
Influe - Foliume

- 79 **Oficiala Informilo**

- 80 **Forpasoj**

La kovrilo: "Metu limon!
Haltigu rasismen."
(Afiŝo de OBESU)

Dekstre: Kariatidoj en
Bankoko (M. Vermaas)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establitita kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 68,32;
USD 34; DEM 59; JPY 3900 ktp); infor-
miĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas € 3,00.

Anonctarifo (eŭroj): 1 p. 1000, 1/2 p.
550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera
kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja
ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-
konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:     

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.
Telefona: +31-10-436-1044.
Telefakso: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
TTT: <http://www.uea.org>
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo:
Pasquale Zapelli.



NE PER ENIGMAJ ALUDOJ

Neniu scias nombri kiom da homoj parolas Esperanton. Oni eĉ ne konsentas kiujn oni tiam devus nombri. Pli facile devus esti pri organizitaj esperantistoj, ĉar temas "simple" pri membroj de organizaĵoj, abonantoj de gazetoj kaj partoprenantoj de renkontiĝoj.

Tamen, eĉ tiu nombrado ne eblas, ĉar tro multaj kaŝas siajn statistikojn. Neniu povas devigi ekz. konatajn internaciajn E-gazetojn publikigi la nombron de siaj abonantoj. Laŭvole ili povas mistifiki nin per nekontroleblaj aludoj pri "kresketo", "stabileco" aŭ io same enigma. Tiom pli laŭdindaj estas la esceptoj, kiuj ja aplikas publikecon.

UEA estas malferma organizaĵo, demokratie regata kaj kontrolata de la membroj. Tial, krom publikigi siajn jarajn financojn, UEA aperigas ĉiujare statistikon de siaj membroj kaj abonantoj. Same estas pri UK kaj IJK, eĉ pri Malfermaj Tagoj. Ĝi publikigas furorlistojn kaj vendosumojn de sia libroservo. Se ankaŭ UEA farus nur misterajn aludojn, ĉiuj vagus en mallumo pri la dimensioj de nia movado. Ĉar UEA estas ĉiurilate la plej granda kaj reprezenta E-organizaĵo, ĝiaj statistikoj estas fidinda bazo por sekvi la iradon de nia afero.

Kvankam nia jara membrostatisiko (p. 66) montras por komparo nur la ciferojn de la antaŭa jaro, el la ŝanĝoj inter du jaroj estas riske fari konkludojn. Sen kono pri la influo de UK aŭ de manko de peranto

en iu lando aŭ pri aliaj okazaj faktoroj, oni povus multe erari. Eblas fidiĝi konstatante nur ke de 13 jaroj la individuaj membroj nombras pli ol 7000, kaj ke en grandaj trajtoj ilia nombro restas konstanta post la dua mondmilito. Nur ilia distribuo laŭ landoj ŝanĝiĝis kaj estas nun pli tutmonda, grandparte dank' al pli da membrigoj pere de Fondaĵo Canuto. En la 80-aj jaroj eblis "kanutigi" ĉ. 300 gesamideanojn jare; en la 90-aj ilia nombro triobliĝis.

Jen kaj jen oni diras ke "kanutigoj" estas artefarita ŝveligo de la membraro. Tio ofendas la solidarecon de la donacintoj, sed eble eĉ pli la koncernajn membrojn, ĉar ili verŝajne estas averaĝe pli aktivaj ol la cetera parto de nia membraro. Ili ja devas kandidatiĝi por membreco kaj resti daŭre aktivaj por reteni ĝin.

Espereble ni povos baldaŭ radikale plimultigi la nombron de tiuj nepagipovaj samideanoj kiuj vidos plenumita sian deziroregion ricevi la membrokarton de UEA kiel pasporton pri efektiva civitaneco de Esperantujo. UEA havas dudekon da fondaĵoj por plej diversaj agadkampoj. Ili ĉiuj estas ege necesaj, sed la plej necesa estas Fondaĵo Canuto, ĉar ĝi certigas la universalecon de UEA kaj plifortigas ĝian plej gravan kapitalon, la membraron. Investu ankaŭ vi efike kaj sekure: donacu al Fondaĵo Canuto!

Osmo Buller



— *Interŭjuo kun Tahar Ben Jelloun: "Pensi en"*

En mansardo de i

■ **En Esperanto oni povas koni vin, almenaŭ ĝis nun, nur laŭ via libreto pri rasismo, kiun UEA eldonis. [Vidu feb., p. 33]. Ĉu tio ne iom tro reduktas la bildon pri vi?**

Jes, kompreneble ekzistas tia risko. Sed mia verkista vivo ĉiam konis du aspektojn: tiun de la romanisto kaj poeto, kaj tiun de batalanto, civitano, homo kiu interesiĝas pri la problemoj de ĉiutaga vivo.

■ **Ĉu ne estas kontraŭdiro inter tiuj du aspektoj?**

Estas vero ke en pluraj landoj — Francio, Italio, Germanio — mia libro *La rasismo klarigita al mia filino* [titolo de la franca originalo — *Red.*], pro sia granda sukceso, povus ombri miajn ceterajn verkojn. Sed mi kredas ke miaj romanoj tamen ne riskas forgesiĝon, ĉar en tiuj landoj mi estis jam sufiĉe konata antaŭ la apero de *La rasismo* . . . Do, ĉar ne ekzistas unulingvaj esperantistoj, mi povas esperi ke interesatoj trovos miajn verkojn en sia denaska lingvo.

■ **Ĉu la enorma sukceso, eble neatendita, ne perturbas vian vivon?**

Regule okazas ke mi prenas starpunkton pri debatataj temoj, sed de post la apero de la libro mi evitas partopreni politikajn eventojn publikajn. Kompanse, mi multe vizitis lernejojn. Tie mi partoprenis tre interesajn debatojn kun miaj junaj legantoj, kiuj ofte starigis demandojn pri kiuj mi ne pensis antaŭe. Por iom dokumenti tion, mi cetere aldonis apendicon al la dua franca eldono de la libro.

■ **Sed la originan tekston vi ne ŝanĝis.**

Ne, ĉar ĝi restas "funkcianta", por tiel diri. Mi ŝanĝetis nur unu aŭ du vortojn, kie mi estis vere mistrafinta.

Aliflanke, intertempe fortiĝis mia impresoj ke valorus la penon pli funde ellabori kelkajn temojn kiujn mi trovas aparte gravaj. Unu tia temo estas la ekzisto de unusola komuna homa raso, prefere homa *genro*, diversa en siaj multaj varioj. . .



David Carr, © Suail

■ **Sed ĉu eble ni ja akceptu ke "raso" havas diverĝajn signifojn en diversaj lingvoj? La recenzanto en nia revuo opinias, ekzemple, ke "diversaj rasoj ekzistas".**

Eble la signifoj ja malsamas. Sed mi preferas radikalan aliron al la lingvouzo, por eviti la riskon ke lingva misuzo mise influu la pensadon. Vortoj ja povas esti mortige vundaj, same kiel sago. Tial, ekzemple, necesus ne plu uzi esprimojn ĉe kies origino staras rasismaj antaŭjuĝoj, kiel en la franca *un rire jaune* ("flava rido") por "hipokrita rido", pro la supozata hipokriteco de azianoj.

■ **Se paroli pri antaŭjuĝoj, kion vi pensas pri tiuj kiuj rilatas simile al Esperanto?**

Nu, mi mem ne multon scias pri ĝi, sed ĝi elvokas ĉe mi rideton, ĉar mi trovas la ideon malantaŭ Esperanto larĝanima, sed malfacile ĝeneraligebla. Lingvo kaj tero kunapartenas; forlasi sian teron kaj sian lingvon estas similaj spertoj.


■ **Vi mem ne plu vivas en via naskiĝ-lando Maroko, kaj vi verkas france. Do, ĉu tamen eblas elekti por si lingvon, kiel ankaŭ la Esperantaj aŭtoroj faras. . . ?**

Tahar Ben Jelloun

Tahar Ben Jelloun naskiĝis en Fez (Maroko) en 1944 kaj vivas en Francio konstante de 1971. Doktoro pri socia psikiatrio, li beletre debutis per poemaroj (1971) kaj per la romano *Harrouda* (1973). Verkas fikcian prozon, poezion kaj (precipe por *Le Monde*) artikolojn. Post dekludo da volumoj, li gajnis la prestiĝan premion Goncourt en 1987 pro la romano *La sakrala nokto*. La libreton *Paĉjo, kio estas rasismo?* li verkis en 1997 klarige por sia filino Mérième, tiam 10-jara. Ĝi estis tradukita al 28 lingvoj, i.a. en Esperanton.

idea mondcivitano

En sia subtegmenta verkejo-oficejo akceptis Tahar Ben Jelloun, aŭtoro de *Paĉjo, kio estas rasismo?*, la redaktoron de ĉi tiu revuo, la 2-an de marto en Parizo.



Dum kontraŭrasisma manifestacio kiel la ĉi-supra, naskiĝis ĉe Tahar Ben Jelloun la ideo libre klarigi al sia 10-jara filino pri rasismo.

Ne, mi ne dirus tiel. Tio sonas tro kvazaŭ verkado en iu aŭ alia lingvo estus simple teknika demando. En mia kazo, la franca estis mia lerneja, poste studa lingvo, tiel ke mia personeco kreskis en ĝi, ankaŭ en ĝi. En kiu lingvo oni verkas — tio dependas de onia konkreta sorto.

■ Ĉu vi do taksas vin mondcivitano?

En la realo, la vorto "mondcivitano" ne havas konkretan signifon. Konkrete, oni ja vivas, loĝas, spertas en iu difinita loko. En la kampo de ideoj, "mondcivitanejo" kompreneble havas sencon: ĝi signifas klopodon pensi en idea kadro ampleksanta la tutan homaron.

■ *Revene al via libro: Ĉu, laŭ via sperto, oni akceptis ĝin malsame en malsamaj landoj? Ekzemple, kiel en Israelo, la lando de la venonta Esperanta mondkongreso?*

Jes, fakte Israelo estis escepto; en aliaj landoj la reagoj estis sufiĉe similaj inter si. Krom en la lernejo de la Paco-oazo [vidu marto, p. 42], mi povis senti multe da streĉo en la aero: la tensio inter judaj kaj arabaj infanoj, kiu ne rajtis eksplodi en la lerneja korto, trovis por si eliron en akraj vortoj kiujn ili adresis ŝajne al mi, sed reale unu grupo alparolis la alian pere de mi.

Se pritrakti la merkatan akcepton de mia libro, mi devas diri ke, dum ĝi bone vendiĝis en ekz. Svedio, ĝi tute ne havis sukceson en Hispanio, kie la homoj, ŝajnas al mi, malpli perceptas rasismon kiel problemon, eble repuŝante ĝin en sian subkonscion. Post kelkaj semajnoj, cetere, mi vojaĝos al Aŭstrio por renkonti miajn legantojn.

Tahar Ben Jelloun

La samlandano

Hadiĝa estas belulino. El Magrebo ŝi havas la koloron de somera tero kaj la bluan de la nuboj. La rido de ŝiaj okuloj obeigas birdojn spitemajn. Sed en ŝia rigardo — paŝtejoj da tenero. Simplaj gestoj. Pudoro.

En Parizo de kelkaj jaroj, ŝi baldaŭ finstudos medicinon. Ŝi bone konas siajn laboristajn samlandanojn, kiujn la tempo igis forlasi sian landon. Ŝi batalas ĉe ilia flanko.

Iun dimanĉon, ĉe eliro el la metroo, alpaŝis ŝin laborista enmigrinto, provanta forpeli sian solecon.

— Vi estas bela, fratino...

Hadiĝa ridetis.

— Diru, fratino, vi estas arabo, ĉu ne?

Hadiĝa jesis kun eta rido.

— Diru, fratino, gazelino sub luno, ĉu vi trinkos kafon

kun via magreba frato... dimanĉoj estas longaj, malgajaj... Kaj la aliaj ne emas paroli... Venu, do, ni parolu pri la hejmlando...

En la menso de Hadiĝa interpuŝiĝis vortoj kaj bildoj: elmigro... soleco... nostalgio... kulposento... forlogo... ekzilo... melankolio... perforto... banala rasismo... Interparoli, kial ne?

— Bone, dankon pro via invito.

En la kafejo ili interŝanĝis kelkajn impresojn pri la laboro, la ekzilo, la ferioj... poste ekestis longaj silentoj, iom da ĝeno.

La viro elpoŝigis dekfrankan bankbileton kaj metis ĝin inter la mamojn de Hadiĝa. Ŝian surprizon sekvis nebridebla rido. La viro embarasiĝis, pardonpetis. Hadiĝa trankviligis lin, donis kiseton survange kaj foriris...

El la volumo *Le premier amour est toujours le dernier* ("La unua amo estas ĉiam la lasta", 1995). Aperis unue en 1977. Tradukis el la franca István Ertl.

Kiam mi pasintjare surpronis la respondecon de Rondo Familia (RF), fondita en 1994 por interligi esperantistajn familiojn, mi dissendis dokumenton kun miaj agadideoj. Kiel ĉefajn strebojn mi indikis flegadon de familiaj aranĝoj (specife revigligon de Internacia Infana Kongreso, IIK) kaj fortigon de la ligo inter E-familioj, unuavice per la *Cirkulaĵo* de RF, rekonceptenda tiel ke ĝi pli interusu ankaŭ ĝeneralan publikon.

Jen ĝisdatigo pri la situacio kaj kelkaj pensoj por la estonteco.

La sukceson de la baldaŭa IIK (vidu feb., p. 27, kaj ligan ĉe la UEA-paĝo <http://www.uea.org>) garantias bonega ejo kaj kapabla, energie laboranta gvidanto, Stefan McGill, kiu daŭrigas la multjaran, meritplenan laboron de Kristoforo Fettes.

La ĝisnuna *Cirkulaĵo* plu aperas kiel *Familia Esperanto*, sub la sceptron de nova redaktoro, Katarína Bodnárová (adreso en la suba anonco).

La financa situacio de RF povus perspektive iom pliboniĝi, i.a. pro la enspezoj el la furore vendiganta libreto *Hejma Vortaro* (vidu marto, p. 53), kvankam pro la necesa investo en ĝian eldonadon la saldo de nia UEA-konto "idoj-p" provizore ĝuste malkreskis.

Ponto inter verdaj generacioj

Amri Wandel



La komisiito pri Rondo Familia pentras detalan bildon pri la nunaj stato kaj agado de ĉi tiu strategie grava UEA-instanco.

Ĉies mon-apogo estas do utila kaj eĉ tre necesa, ĉar *Familia Esperanto* ne vivas el abonkotizoj, sed estas senpage sendata al la regulaj ricevantoj, sendepende de la fakto ĉu tiuj familioj kapablas aŭ ne finance kontribui.

Interligi generaciojn

RF plenumas gravan servon kiel ligilo inter familioj kaj aĝogrupej: ĝi reprezentas la mezan generacion, kiu ofte ankaŭ havas malgrandajn infanojn. Tiu generacio troviĝas meze inter la du grupoj konsistigantaj la plejparton de la Esperanto-movado: la junularo kaj la pliaĝuloj. Mi kredas ke RF devas ĉiam pli klopodi por krei pliajn ligojn inter la generacioj plej juna (6-14 jaroj; IIK kaj familiaj aranĝoj), la junulara (18-26; TEJO), la meza (kiu grandparte mankas aŭ pasivas en la movado) kaj la pli aĝa. Se vi interesiĝas pri efektivigo de tiuj celoj, bonvenas viaj ideoj.

Familia Esperanto

- Cirkulaĵo de Rondo Familia, kun
- anoncoj kaj raportoj pri E-renkontiĝoj por familioj;
 - personaj rakontoj de E-familiaj spertoj kaj travivaĵoj;
 - ŝercoj, anekdotoj kaj multe pli



estas ricevebla, de UEA aŭ de la redaktoro Katarína Bodnárová (Hlavná 63, SK-07631 Streda nad Bodrogom, Slovakio) kontraŭ libervola kontribuo al la UEA-konto de Rondo Familia, "idoj-p".



En 1999 224 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK kaj donaceton kun la Jarlibro, kiu en 1999 estis kolekto de Esperanto-poŝtmarkoj. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.



POR FACILE TROVI ALIAN VORTON

ESPERANTAJ SINONIMOJ. Jaan Ojalo (1914). Rotterdam: UEA, 1999 (3-a, korektita eld.). 96p. Prezo: € 7,20.

Ofte oni sentas la bezonon vigligi kaj variigi sian stilon per uzo de sinonimoj aŭ de preskaŭ-sinonimoj. Por helpi en tio, la estona aŭtoro kompilis tiun ĉi vortaron. Bazita sur PIV, ĝi enhavas 1925 kapvortojn kaj 5500-vortan indekson. Taŭga fonto por ĉiu kiu volas pliriĝi sian vortostokon.



Ŝtopi la aĝ-breĉojn

Oni povas konstati la ekziston de du “breĉoj” en la generacia sinsekvo, kie mankas taŭga kadro por teni la homojn proksimaj al la movado: la aĝgrupo inter 14 kaj 18 jaroj, kaj la grupo de mezaĝuloj. RF okupiĝas pri Esperanto-familioj kun infanoj, sed ĝis nun la meza generacio — okupita de profesia kariero kaj kreskigo de familio — tro ofte malaperis el la movado aŭ “endormiĝis”. Ni devas plilarĝigi la respondecon de RF tiel ke ĝi inkluzivu ankaŭ la ceterajn grupojn. Pri la plej juna grupo helpas la familiaj Esperanto-aranĝoj, kiel Renkontiĝo de Esperanto-Familioj (REF) kaj aparte IIK. Al la “grupo 14-18” povas ion alporti la junulara programo dum la UK, ekzemple per kombino de lecionoj (la “kongresa mezlernejo”, projekto proponata de ILEI) kaj distra programo. Homoj el tiu aĝgrupo, kaj eble ankaŭ de TEJO-aĝo, povas helpi en la prizorgado kaj distro de infanoj dum IIK.

Ĉu oldulejo aŭ mirakla mondo?

Ni devas dediĉi apartan atenton al la infanoj de Esperanto-familioj, ĉar ili troviĝas en aĝo decida por ilia Esperanta evoluo: ĉu ili perceptos Esperanton kiel enuan kunvenadon de olduloj aŭ kiel mondon miraklan ankaŭ por infanoj? Tial ili bezonas pli da okazoj por sperti Esperanton en internacia etoso, kian ĝuste IIK ebligas. Ĝi samtempe donas al la gepatroj la okazon partopreni Universalan Kongreson, ne aŭ malfacile ĉeesteban kiam oni devas zorgi pri junaj infanoj. Por ke IIK povu plene efektivi tiun potencialon, ĝia kotizo devus esti sufiĉe malalta, simila al la nivelo kutima ĉe REF. Tiusence mi prezentis al la Komitato konkretan proponon, en kiu mi ankaŭ rekomendis varbadon de pluraj profesiaj prizorgantoj de IIK, por garantii ties kontinuecon per alternigo de la gvidantoj; fiksi publikajn kriteriojn pri la okazigo de IIK (ekz. la minimume necesa nombro de aliĝintoj); serĉi la monrimedojn bezonatajn.

Espereble, ĉio ĉi plifortigos la familian kaj generacian koherecon de nia movado, por krei situacion socie kaj generacie pli ekvilibrantan, pli similan al tiu de la plej multaj aliaj lingvoj. ★

Ĝardeno sur alta grundo

Renato Corsetti

En tempa kaj loka proksimeco al la UK, ne indos maltrafi unikan interkulturan rendevuon, kiu realiĝos pere de Esperanto.

La Nobla Korano, en sia Esperantlingva interpreto (2, 266), diras ke tiuj kiuj “disdonas el siaj havaĵoj” por bonaj celoj, “similas al ĝardeno sur alta grundo”, kiu donos duoblan rikolton, ĉar “Allah vidas kion vi faras”.

Kiel tio rilatas al la seminario pri “Tutmondiĝo kaj la arabaj landoj”, (Amano, Jordanujo), de 22 ĝis 24 julio, tuj antaŭ la UK en Tel-Avivo?

La rilatoj inter Esperanto kaj homoj en arabaj landoj estis ĉiam pli-malpli malfacilaj. Araboj ne bone komprenas kion signifas “internacia lingvo”. Ĉu Esperanto celas forigi la araban kiel lingvo de la islama komunumo? Ĉu E-o estas religio? Siaflanke, e-istoj ne bone komprenas la komplikajn naciajn, gentajn, religian situacion en arabaj landoj. Aldoniĝas ke, laŭ la amasinformiloj, islamanoj lastatempe iĝis tre problemdonaj, ĉar ili, imagu, aŭdacas rifuzi la superecon de la “makdonaldz-a” civilizo.

En tiu situacio la kelkaj arabaj e-istoj baraktas inter la nekompreneco de siaj samgentanoj kaj tiu de siaj nearabaj samlingvanoj. Nur lastatempe ekestis UEA-komisiono por la araba mondo.

El la vidpunkto de araboj, aferoj ne estis ĉiam tiaj. En sia plej brila periodo la islama estis unu el la plej progresintaj kaj malfermaj civilizoj. La profeto mem, Muhammad, diris ke oni serĉu scion eĉ en Ĉinujo, do ke oni estu malferma al la ekstera mondo. Kaj tion ĉiu islamano, eĉ plej neklera, povas citi al vi.

Simile, la arabaj landoj forte malsamas inter si. Jordanujo, ekzemplo de modero kaj trankvilo, ĉiel klopodas vivi pace kun siaj najbaroj. Ne surprize, du universitatoj de la lando instruas

la hebrean. Nature, do, ke la unua kunveno de e-istoj en arabaj landoj kaj e-istoj el nearabaj landoj okazos



Panoramo el Amano

en Amano. Pri la ĉeftemo, “Tutmondiĝo kaj la arabaj landoj”, prelegos konataj nearabaj e-istoj, kiel Humphrey Tonkin, kaj pluraj e-istoj arabaj. Ĉeestotos reprezentantoj de la ŝtataj instancoj kiuj gastigas la seminarion en la plej prestiĝa kulturcentro de Amano.

La aliĝkotizo estas simbola (10 us. dolaroj). Amano disponas hotelojn en pluraj kategorioj. Eblas seminarii partatempe, kiel faros aliĝintoj de la oficiala UEA-antaŭkongreso (vidu feb., p. 26).

Jordanujo, mi diru tion, estas loko multe pli trankvila kaj sekura ol mia hejmvilaĝo en Italujo. Somere iom pli varmas tie ol en Hispanujo aŭ Grekujo, sed ĉu tio timigos pacajn batalantojn?

Via ĉeesto firmigos la sperton de arabaj esperantistoj pri la efektiva ekzisto kaj funkciado de Esperanto.

Vi komprenas nun kial, “donante el viaj havaĵoj” (ĉi-kaze du-tri tagojn el via tempo) por nobla kaŭzo (helpi interkompreniĝon inter araboj kaj nearaboj pere de E-o), vi faros ion kio igos vin “ĝardeno sur alta grundo”, laŭ la komence citita Korana teksto.

Por aliĝi, kontaktu la Araban Komisionon ĉe la kutima adreso de UEA.

LA MEMBRARO DE UEA EN 1999

Lando	AM	IM	Sume	Lando	AM	IM	Sume
Albanio	0	33	33	Kostariko	10	17	27
Alĝerio	0	2	2	Kroatio	210	109	319
Angolo	0	1	1	Kubo	100	51	151
Argentino	100	67	167	Kuvajto	0	1	1
Armenio	30	16	46	Latvio	64	21	85
Aŭstralio	171	71	242	Libano	0	3	3
Aŭstrio	14	51	65	Libio	0	1	1
Azerbajĝano	0	1	1	Litovio	78	51	129
Bangladeŝo	0	1	1	Luksemburgio	103	13	116
Barejno	0	1	1	Madagaskaro	15	12	27
Belgio	504	185	689	Makedonio	45	23	68
Belizo	0	1	1	Malajzio	0	2	2
Benino	0	7	7	Malto	42	3	45
Bermudo	0	1	1	Meksiko	20	11	31
Bjelandusio	0	16	16	Moldavio	0	6	6
Bolivio	0	5	5	Mongolio	0	6	6
Bosnio-Hercegovino	50	45	95	Nederlando	293	349	642
Brazilo	265	551	816	Nepalo	0	10	10
Britio	510	230	740	Niĝerio	0	16	16
Bulgario	140	73	213	Nikaragvo	0	4	4
Burundio	0	2	2	Norvegio	292	70	362
Ĉeĥio	166	102	268	Nov-Zelando	38	36	74
Ĉilio	25	8	33	Pakistano	100	18	118
Ĉinio	963	187	1150	Panamo	0	2	2
Danio	119	108	227	Papua Novgvineo	0	3	3
Dominika Resp.	0	1	1	Paragvajo	0	1	1
Ebura Bordo	25	3	28	Peruo	25	6	31
Egiptio	0	3	3	Pollando	330	150	480
Ekvadoro	0	2	2	Portoriko	0	1	1
Estonio	24	40	64	Portugalia	268	16	284
Filipinoj	0	5	5	Ruando	0	3	3
Finnlando	213	234	447	Rumanio	15	57	72
Francio	173	686	859	Rusio	65	170	235
Ganao	0	3	3	Salvadoro	0	2	2
Germanio	1079	587	1666	Samoo	0	2	2
Greklando	271	23	294	San-Marino	0	1	1
Gvatemalo	0	6	6	Saŭda Arabio	0	1	1
Haitio	15	1	16	Senegalio	0	14	14
Hinda Unio	100	26	126	Slovakio	207	32	239
Hispanio	329	190	519	Slovenio	100	26	126
Hungario	232	122	354	Srilanko	0	4	4
Indonezio	0	3	3	Sud-Afriko	34	10	44
Irako	0	1	1	Svedio	686	255	941
Irano	20	69	89	Svislando	76	134	210
Irlando	50	14	64	Taĝikio	0	2	2
Islando	50	32	82	Tajlando	0	1	1
Israelo	119	65	184	Tanzanio	0	15	15
Italio	895	253	1148	Togolando	43	10	53
Japanio	1062	409	1471	Tunizio	0	2	2
Jugoslavio	110	53	163	Turkio	0	4	4
Kamboĝo	0	2	2	Ukrainio	121	49	170
Kamerunio	0	6	6	Urugvajo	30	9	39
Kanado	120	79	199	Usono	429	389	818
Kartvelio	25	4	29	Uzbekio	0	9	9
Kazaĥio	0	7	7	Venezuelo	15	19	34
Kenjo	0	3	3	Vjetnamio	150	42	192
Kolombio	50	22	72	Zambio	0	1	1
Komoroj	0	1	1	Zimbabvo	0	1	1
Kongo, Dem. Resp.	50	14	64				
Kongo, Pop. Resp.	0	2	2				
Korea Resp.	23	61	84				
				119 LANDOJ	12096	7073	19169

LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBRO-STATISTIKO

Kategorio	1998	1999
Membro-Gvidlibro	435	510
Membro-Jarlibro	1859	1528
Membro-Abonanto	3405	3403
Juna Membro-Jarlibro	452	450
Juna Membro-Abonanto	260	220
Dumviva Membro	859	876
Juna Dumviva Membro	17	17
Honora Membro	61	57
Honora Patrono	12	12
INDIVIDUAJ MEMBROJ	7360	7073
Aligitaj membroj	10853	10447
Junaj aligitaj membroj	1959	1649
MEMBROJ ENTUTE	20172	19169
Societo Zamenhof	224	224
Abonoj Esperanto	195	185
Kolektivaj ab. Esperanto	121	119
Abonoj Kontakto	405	408
Kolektivaj ab. Kontakto	465	352
Patronoj de TEJO	100	96
Dumvivaj Patr. de TEJO	13	14
KOTIZOJ ENTUTE	21695	20567

La nombro de individuaj membroj (IM) malkreskis en 1999 je 287. La perdoj koncernis ĉefe la kategorion Membro-Jarlibro (-331), pro influo de pli malgranda UK. La IM-oj unufojaj aŭ kiuj ne aliĝis en la antaŭa jaro estis entute 1231. Atentinda estas la pli alta nombro de Dumvivaj Membroj (+17), post 9-jara ŝrumpado. Mankis la kutima pozitiva kontribuo de la kongresa lando. Al la atendita malkresko en Francio (-208, ĉiuj el kiuj kongresanoj en 1998) ne respondis komparebla kresko en la pasintjara kongreslando Germanio (-15). Cetere perdis IM-ojn i.a. Rusio (-58) kaj Rumanio (-44), dum plej multe kreskis Brazilo (+40) kaj Svedio (+29). Novaj aldonoj al la statistiko estas Bermudo kaj Dominika Respubliko. Pli da Aligitaj Membroj (AM) estis anoncitaj unuavice el Pollando (+90) kaj Germanio (+62). La tuta nombro de AM tamen malkreskis, kun perdoj ĉefe en Francio (-239), Korea Resp. (-181) kaj Hungario (-116). Negative influis la nombron de kotizoj mapliĝo de la kolektivaj abonoj por Kontakto, i.a. en Hispanio, Ĉinio kaj Afriko.

pz

Kunzorgi pri lingva plureco



Prof. de Yzaguirre reprezentis UEA en kunveno (Barcelono, 24-26 feb.) de Konsulta Komitato de Unesko por Lingva Plureco kaj Multlingva Eduko.

Post paroladoj i.a. de komitat-estro Félix Martí kaj de Carlos Spottorno, gvidanto de la hispana Unesko-komisiono, invititoj prezentis plurajn projektojn. Paul Ortega, direktoro de

Unesko-centro en Eŭskio, priparolis la Unesko-raporton “La lingvoj de la mondo”, kiu ricevis jam respondojn pri ĉ. 500 lingvoj. Laŭ Carles Torner, estro de komisiono de Internacia PEN

pri tradukado kaj lingvaj rajtoj, la Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj (1996; vidu dec. ‘98, p. 206), kaj submetita al Unesko por aprobo, ne estis ŝatata de pluraj ties delegacioj aŭ funkciuloj.

En sia fina raporto la komitato rekomendas i.a. ke Unesko engaĝiĝu en la “pensado pri lingvorilataj homrajtoj” kaj “favoru la evoluigon de multlingvaj iloj”, studante “la efikon de novaj lingvaj teknologioj sur la lingvo-diversecon”.

Kiel kutime en similaj okazoj, gravis “koridoraj kontaktoj”. Prof. Yzaguirre — lingvisto scipovanta E-on pro scienca intereso, sed ne movadano — povis ofte neformale klarigi sian altan takson pri Esperanto. Li konkludas ke UEA bezonas ian “kvinan kolonon” de lingvistoj kapablaj je pure scienca argumentado. Inter liaj ceteraj rekomendoj estas ke UEA atente sekvu la laborojn de ĉi tiu komitato kaj studu la projekton Perikles pri translima interkonatiĝo, proponante eksperimentojn en ŝtatlimaj regionoj kie kunestas pli ol du lingvoj. UEA povus helpi al Unesko per ideoj por la Internacia Tago de la Patrino Lingvo (21 feb.) kaj la Tago de la Lingvoj Malpli Uzataj (15 apr.).

Laŭ raporto de prof. Lluís de Yzaguirre • Katalunio

Movada strategio

Por laŭpaŝa oficialigo

Oszkár Princz • Hungario

Foraj problemoj povas subite iĝi urĝaj — eventuale eĉ por nia movado.

Programistoj de komputiloj antaŭ jardekoj taksis la jarmilŝanĝon tiel fora ke ili ne zorgis pri la problemo transigi datumojn de 1999 al 2000. En Esperantio oni taksas la oficialan akcepton de nia lingvo tiel fora ke ne estas ellaboritaj metodoj pri tio kiel funkcii E-o se okazos tia akcepto.

Pri oficiala akcepto de Esperanto ni en Hungario havas du-tri jardekojn da spertetoj, analizeblaj kvazaŭ laboratoria modelo por la tempo kiam ĝi estos pli vaste akceptita en certa rolo.

En Hungario jam de la 60-aj jaroj E-o estas, laŭ la leĝoj, studobjekto lernebla. De 1966 ĝi estas inter la lingvoj pri kies kono la Ŝtata Lingvokomisiono

de Univ. ELTE (Budapeŝto) donas diplomon. Laŭ leĝo el 1994, kondiĉo por studofine diplomiĝi en supera lernejo estas jam havi diplomon pri scipovo de unu aŭ du lingvoj (ne gravas kiuj).

Jen: ekstermovadaj instancoj estigis cirkonstancojn favorajn por nia lingvo. En 1995, 602 personoj trapasis ŝtatan lingvoekzamenon pri ĝi; en 1996: 521; en 1997: 545; en 1998: 564; en 1999: pli ol 600. Tiu nova semo sukcesis ĝermi nur ĉar la hungaraj e-istoj dum la pasintaj 3-4 jardekoj informis amase pri Esperanto. Ekz. lernolibroj aperis en pli ol 200 mil ekzempleroj (en lando kun 10 milionoj da loĝantoj), kaj hungarlingvaj informiloj pri E-o en

750 mil ekz. Tial nun multaj diplom-bezonantoj povis rememori ke ekzistas iu lingvo lernebla pli rapide ol aliaj.

Sed kiel respondi la novan defion: instrui Esperanton dum jaro al 600 homoj, plejparte universitatanoj, plenaĝuloj, kiujn apenaŭ interesas la movado, kiuj ĉefe celas akiri diplomon?

Niaj lastatempaj spertoj instruis ke nia unuaranga tasko devus esti enigi E-on en la normalan reprodukto-proceson de la ŝtato, laŭ formulo de Géza Felső. Ĉi tiun celon ni povas atingi nur pere de laŭpaŝa oficialigo de Esperanto.

De kiam leĝo ebligas instrui E-on en lernejoj, e-istoj povas postuli la efektivigon de tiu rajto. De kiam eblas instrui Esperanton en bazaj kaj mezaj lernejoj, e-istoj rajtas postuli universitatan edukadon de E-instruistoj.

Konklude: ni ne devas timi la oficialigon de Esperanto, sed atingi oficialigon laŭpaŝan, kaj prezenti la lingvon Esperanto al tiuj por kiuj ĝi povus esti utila. ★

Esperanto venis al barata vilaĝo

Atilio Orellana Rojas - Nederlando



Atilio Orellana Rojas

Entuziasmo naskis idon de la ambicia projekto "Indiĝenaj Dialogoj" (vidu dec. 99, p. 206) en malcentra angulo de Barato.

Longtempe dezirata revo fine ektrovis ian vojon al realiĝo, kiam en pasinta decembro mi babiladis kun unu el miaj gelernantoj en koridoro de la lingvo-instituto Narwal dum Esperanto-kurso kadre de la projekto "Indiĝenaj Dialogoj" (ID). Li, s-ro Jebra Muchahary, direktoro de

la elementa lernejo St. John's Mission en la ŝtato Assam (orienta Barato), invitis min instrui tie Esperanton.

Esperanton en ĉiu angulo

Li tuj komprenis ke, se li ne praktikos la lingvon post la reveno el Nederlando, liaj konoj iom post iom simple

malpliigos. Lia strategio estis, do, esperantigi sian lernejon, por ke li havu ĉiuangule kun kiu uzi Esperanton! La unua paŝo estu instrui ĝin al la instruistoj, kiuj siaflanke poste daŭrigu la laboron kun la lernantaro.

Kun mikso de entuziasmo kaj la espero dissemadi Esperanton ankaŭ en tiu mondoparto, mi planadis la alvenon al lia regiono.

La projekto estis elpensita tiel ke mi kunvenigu la baratajn kaj nepalajn lernintojn de la du antaŭaj ID-kursoj, por pluri la vojon en nia lingvo, kaj ke mi ĉefe instruu Esperanton al la stabo de la lernejo St. John's Mission por tiel krei E-neston en Assam.

Esperanto eknestis en ĉiu angulo de lernejo en Assam.

La lernejo troviĝas en la malgranda vilaĝo Bijni, atingebla post plur-

hora veturado meze de fascina pejzaĝo, plena je verdo, spicita per la tre buntaj koloroj de la kamparanaj vestaĵoj. Ne granda distanco apartigas tiun vilaĝon de la landlimo al Butano.

La entuziasmo de la instruistaro vere impresis min profunde. Plurhora instruado ĉiutaga ne lacigis ilin. Male, ili ĉiam pli kaj pli avide kaj aktive paŝadis tra la gramatiko; nura kanto kaj ritma dancado sufiĉis por refreŝiĝi. Jam en la unua tago ili petis ke mi ne nur instruu la lingvon Esperanto,

Nepalo ne-pala, tro-pika

Sakari Kauppinen - Finnlando

Por konigi sian landon al alilandaj esperantistoj, Nepala E-Asocio jam trian fojon organizis internacian renkontiĝon.

Himalaja Renkontiĝo (6 feb. - 7 marto): jen aranĝo mondopinta, kiun kunspertis 70 e-istoj el Barato, Belgio, Finnlando, Germanio, Hungario, Italio, Japanio, Norvegio kaj Svedio, krom el Nepalo mem.

NEspA aktivas jam de pluraj jaroj: ĝi instruas la lingvon, organizas kunvenojn, sendas reprezentantojn al kongresoj kaj eĉ eldonas revuon, *Montejo*. Por nepalanoj la distancoj kaj kostoj tamen ofte fariĝas nesupereblaj baroj

por kontakti kun la tutmonda esperantistaro. Pro tio ili ekhavis genian ideon: se ili ne povas veturi al aliaj landoj, veturu do alilandaj esperantistoj al Nepalo!

Himalaja Renkontiĝo havas fortan turisman karakteron. Ĝi konatigas kun la vivo kaj vidindaĵoj de Nepalo sub la gvido de e-istoj. Kutime oni faras iom pli longan ekskurson ekster la ĉefurbo Katmando, dum kiu nepalaj

kaj eksterlandaj esperantistoj kunvivas, interkonatiĝas kaj praktikas la lingvon. Tiel okazis ankaŭ nun.

Dum la renkontiĝo estis organizita kunveno, al kiu krom esperantistoj estis invititaj lokaj gravuloj pri lingvaj aferoj. Ili juĝis pri Esperanto pozitive; la okazo mem atestis pri la funkciado de la lingvo kaj pri ĝia kapablo krei



sed preparolu ankaŭ didaktikon kaj metodikon, ĉar se ili volas instrui la lingvon, necesas bazoj por la prilingva instruado. La trejniĝon sekvis 25 instruistoj: ili nun kapablas komuniki en nia lingvo.

“Eksidu, hej”

Nia laboro inkluzivis eĉ tradukadon! Komence de la kurso Lakhi, la instruistino pri muziko, bonvenigis min per ĉarma kanto en la loka lingvo boroa, dum kelkaj lernantinoj dancis ĝin. Min tre emociis tiu ritmo, kaj ĉiutage ni provis eltrovi ĝustan tradukon akorde al la origina muziko. Dum la kursofermo ni jam ĉiuj kantis “Eksidu, hej”.

Post ĉi tiu mirinde inspira vojaĝo, mi profunde dankas al ĉiuj instruistoj en St. John’s Mission, pro ilia nelacigebla simpatio, pro tiom da entuziasmo en la lecionaj horoj, kaj ĉefe ĉar ili sentigis al mi ke Esperanto ja utilas por doni esperon pri amikaj kaj pacaj kontaktoj en lokoj eĉ tiom foraj.

Mi petas vin, leganto, sentigu al ili ke pliaj personoj en la mondo ja volas komuniki per Esperanto: provu dediĉi momenton por skribi karton al ili, kaj se en via biblioteko estas kromaj ekzempleroj de E-libroj, sendu al ili kelkajn. Ili nepre bezonas ĉian helpon kaj subtenon. La adreso: St. John’s Mission, PO Bijni, Dist Bongaigaon, IN-783390 Assam, Hinda Unio. ★

internaciajn ligojn. Pri la kunveno raportis ĵurnalistoj de la loka televido.

Multon ni spertis en Nepalo, ĉi tiu finance malriĉa, sed kulture riĉega lando. Ni nordlandanoj alvenis vintro-palaj, sed post du semajnoj sub la Himalaja suno ni fariĝis, se ne tute brunaj, tamen iom ne-palaj. Nur nia konatiĝo kun la nepala manĝokulturo estis eble tro abrupta: ĝiaj spicoj komence pikis nian buŝon kaj gorĝon.

Nepalaj e-istoj sukcesigis la renkontiĝon per multe da laboro. Ilia movado tamen estas juna kaj malforta. Ĝi bezonas ke ni helpu ĝin, per libroj kaj aliaj esperantaĵoj, sed plej bone mem veturante tien por sperti ilian amikan akcepton, ekz. dum la venonta Himalaja Renkontiĝo, post du jaroj.

Pli detale legu kaj vidu: <http://personal.eunet.fi/pp/skau/nepal.html>

NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la
inform-oceano de Tut-Tera
Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj
konsultindaj paĝoj Esperantaj!



ARANĜOJ

IF, “la unua aranĝo en Esperantujo kiu uzas propran domenan adreson”, dank’ al Philipp kaj Anton Oberndorfer: <http://www.internacia-festivalo.de/>
Kvinpetalo, la staĝejo en meza Francio, kun informoj pri ĉiuj aranĝoj: <http://hometown.aol.com/yannickdum/kvinpetalo.html>

KOMPUTADO

Komputikaj, kibernetikaj, fizikaj ks. artikoloj de Luis Guillermo Restrepo Rivas (Kolombio): <http://LuisGuillermo.com/>
Tekstprilaboriloj por Vindozo: Esperanto Skribanto (John Hoyne): <http://fp.borderline.f9.co.uk/> kaj UniRed (Jurij Finkel): <http://www.esperanto.mv.ru/UTF8/>

LANDOJ, REGIONOJ

E-Asocio de Britio, kun “ligo de la monato”: <http://www.Esperanto.demon.co.uk/>
E-Asocio de Skotlando: <http://www.sciuro.demon.co.uk/sea/>
Caraguatatuba, glaciaj-riĉa, turismemiga brazila urbo proksima al San-Paŭlo: <http://www.caraguatatuba.com.br/esperanto.html>
Kelmis senlime, triangulo ĉe la limoj de Belgio, Nederlando kaj Germanio, kun historio de “la Esperanta ŝtato” neŭtrala Moresnet: <http://users.belgacom.net/esperanto/>
Kroata E-Ligo, jam diversteme heroldanta pri la UK en 2001: <http://pubwww.srce.hr/esperanto-kel/>
Urugvaja E-Societo, kun eĉ literatura paĝo: <http://ttt.esperanto.org.uy/>

LITERATURO, TEKSTOJ

Pri la politika pensado de Noam Chomsky, en traduko por *Liberecana Ligilo*: <http://members.tripod.lycos.nl/jakvo/chomsky.htm>
Manifesto de la Sennaciistoj de Lanti, parte faksimilo de lia manskribo: <http://home.germany.net/101/121591/skk/92ms.html>
István Nemere, propra hejmpaĝo (hungarlingva, sed kun listo de 244 liaj verkoj ĝis januaro 2000): <http://www.holop.hu/~nemere/>
Kalle Pääta, “amata finnlanda verkisto”: <http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto2.htm>
La Zamenhofa *Proverbaro*, zorge de Karl Pov kaj Harri Laine: <http://www.helsinki.fi/~jslindst/proverbaro.html>

RELIGIO

IKUE kaj ĝia revuo *Espero Katolika*: <http://www.chez.com/espradio/ikue/ek.html>
KELI kun sia revuo *Dia Regno* (protestantoj): <http://www.citeweb.net/filipo/keli/>, kun ligo al:
La sankta Biblio: <http://www.esperanto.nu/upsala/biblio/>. Ĉi lasta estas parto de la “Upsala arkivo” de Franko Luin, kiu krome enhavas *Bona sinjorino* de Eliza Orzeszko (trad. Kabe) kaj fabelojn de Andersen (trad. Zamenhof).

REVUOJ

Helianto, informilo de Ukraina E-Asocio, deŝutebla en PDF-formato: http://www.geocities.com/niko_helianto/
Juna Amiko: <http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto/>

Reagoj



La kontribuoj aperantaj en ĉi tiu rubriko esprimas la opinion de siaj aŭtoroj, kaj la redakcio ne respondacas pri ili.

Jes, ni rajtis atendi pli

La novjara mesaĝo de la UEA-prezidanto (jan., p. 1) estas la plej bona kiun mi iam legis en tiu ĉi revuo; mi eĉ frande legis ĝin plurfoje. Abundas en ĝi trafaj, konsciaj kaj realismaj ideoj pri la estonteco; cetere, ne nur rilate al UEA, sed — kiel la verkinto skribas — ankaŭ al “nia” movado kaj “nia” komunumo.

Sed mi povas malfacile konsenti pri unu el liaj frazoj: “ĉu ni vere rajtis atendi pli ol tio kion ni jam atingis?” Ne estas klare al mi ĉu tiu “ni” rilatas al UEA, al la movado, aŭ al tiu neklare difinita “komunumo”? Sed, se ĝi rilatas al UEA, laŭ mi oni prave povus diri: *jes, ni rajtis atendi pli*; sed samtempe ni agnosku ke pri tiuj nerealigitaj esperoj ne kulpas la nuna prezidanto, relative nova en la E-movado.

Mi mem uzos ĉi tie la vorton *ni* en la senco “mi kaj multaj aliaj UEA-membroj”, kaj mi ne hezitos diri: pluraj UEA-estaroj ne bone funkcias pro internaj malkonsentoj,

kaj ankaŭ la Centra Oficejo plurfoje havis siajn problemojn. Krome, ĉu la revuo ĉiam kontribuis al iu pozitiva sento? Ĉu ni kontentu pri la malkohera festado de la centjariĝo de la lingvo Esperanto en 1987, tiu unika okazo por konigi la E-fenomenon? Ĉu ni pretervidu ke dum jaroj la UEA-laboro estis malhelpata de iama prezidanto, kiu ne povis digesti ke la membraro ne plu subtenas lin? Ĉu ni forgesu ke la provo adapti la E-movadon al pli celtrafa formo per “Instituto por Oficialigo de Esperanto” de la fratoj Sekelj estis bojkotata de la tiamaj UEA-estaroj? Ĉu ni silentu pri la grandegaj monsumoj perditaj per transdono de peticio al UN, kvankam kun iom da sperto pri internacia juro eblis antaŭvidi ke ĝi havos neniun rezulton? Ĉu..., ĉu..., ĉu...? Sed, konkrete, ĉu estas vere ke “ni” ne povis atingi pli ol la nunajn rezultojn?

La avantaĝo de novuloj estas ke ili ne kulpas pri faritaj mispaŝoj aŭ neglektoj. Oni tial donu krediton al la

nova prezidanto kaj al la nunaj estraro kaj oficistaro. Sed oni ankaŭ konsciu ke movado povas akiri rezultojn nur se ĝi klare scias kion ĝi celas kaj kiel ĝi sin komprenas. Estos la tasko de la gvidantoj (kaj ne nur tiuj de UEA) klare kompreni tion en la 21-a jarcento.

Wim M. A. de Smet · Belgio

Honora rekordo



La itala urbo Como fieras pri sia rekorda nombro de Honoraj Membroj — du (dec. '99, p. 220). Nu, en Sofio momente ankaŭ estas du HM (Nikola Aleksiev kaj Belka Beleva), sed dum kelkaj tagoj estis tri: en la Berlina UK oni deklaris Honora Membro s-ron Hristo Gorov, kiu bedaŭrinde baldaŭ mortis. Mi supozas ke dum iuj jaroj same estis po pli ol 2 HM en Sofio, kiuj poste mortis.

Mariana Evlogieva · Bulgario

la plimulto, kiu daŭre malhavos aliron al komputiloj kaj similaj modernaĵoj. Estas certe dezirinde ke asocioj mem kreu siajn vojojn kaj kanalojn por Interreta aktivado, sed nepras ne preteratenti la oficialajn organojn, kiuj daŭre devas roli kiel informiloj de la plimulto, interligante esperantistojn ofte izolitajn, kiuj eble ne havas ion alian por konstati la vivantecon de Esperanto.

Ekzemple en nia kontinento, Ameriko, internacia komunikado realiĝas grandparte per la hispana lingvo: do, la E-movado ne povas proponi tiun komunikadon kiel celon, sed ja komunikadan alternativon cele al pli justa mondordo. Estus bone, laŭ la konkretaj kondiĉoj en diversaj landoj kaj regionoj, konvene difini kaj alceli propran strategion kadre de la strategio de UEA.

Maritza Gutiérrez · Kubo

Implicoj ne samaj por ĉiuj

Kiel dirite de I. Fantom (“Implicoj de nova epoko”, nov. '99, p. 189), “la nova pensado atingos ĉiujn”; sed kiam? Certe ne baldaŭ! Jes, ankaŭ al ni, loĝantoj de la t.n. tria mondo aŭ subevoluinta mondo, la nova jarmilo alportas revolucion en teknologio kaj telekomunikado, sed ne atingeban por



Kun viaj kontribuoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. Se vi disponas pri fotoj, sendu ilin al nia redakcio kun indiko pri ilia aŭtoro. Koran dankon!

El la poŝtkesto

Interna Espero

Unu el la vere respektindaj projektoj en Esperantio estas Bona Espero. Dum la lastaj eble 30 jaroj esperantistoj zorgis pri forlasitaj brazilaj infanoj en tiu loko 200 km-ojn norde de la ĉefurbo, en la ĝangalo.

Iu neesperantistino demandas min kial E-grupoj

ĉie ne sendas grupanojn kiuj laboru tie ekz. 3 monatojn. Ĝi tute ne komprenas kial tiom bona iniciato ne ricevas moralan kaj materialan subtenon de la e-istaro. “Ĉu tio estas la Interna Ideo pri kiu ili fanfaronas?” — ŝi demandas. La leganto mem respondu.

Kent Jones · Usono

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

Esperanto en la tutmondisma debato

Fronte al la debato de tiu ĉi jarmilfino, esperantisto ne povas eviti senton de marĝeniĝo. La grandaj temoj de la internaciaj forumoj respondas, ĝenerale, al la gravaj zorgoj de la ŝtatestroj: ekonomio; internacia financo; kreado de blokoj da nacioj kiuj konstituas grandegajn merkatojn kapablajn produktadi kaj konsumadi je la ritmo postulata de nia epoko tiom tutmondiganta.

Ekzemple, en la ekonomia forumo de Davos, laŭ la gazet-raportoj, oni pritraktis temojn de komerco, ekonomio, teknologio, medio, scienco, medicino kaj kulturo “fronte al nova jarmilo”.

Lingva demando forŝovita

Ni povas ŝpari tian demagogan uzadon de “nova jarmilo”, prezentita kiel okazo por reekzameni la problemojn de la mondo, kvazaŭ ne estus eble tion fari je ĉiu ajn alia dato. Kion ni nepre notu estas la fakto ke la lingva demando restas forŝovita al la pli ĝenerala temaro “kulturo”, kaj ke tiu siavice estas nur unu el la multaj temoj postulantaj la atenton de la mondaj estroj.

Dum tiu forumo, la meksika prezidento Zedillo kritikis la kontraŭulojn de tutmondiĝo, laŭdante la bonajn ecojn de la tutmondiĝo

altrudata al ni. Kiel fungoj post pluvo, aperis komentistoj kaj observantoj, kiuj analizis liajn profundajn cerbumojn. Sed ĉu neniuj klarigos kial li parolis en la angla? Se jam McLuhan predikis ke “la medio estas la mesaĝo”, ĉu tiam nenio gravas ke

ĝis la migraj restriktioj kiuj baras partoprenon en kongresoj, se eĉ ne paroli pri la specifaj kondiĉoj de la triamondaj landoj, kie tiaj agadoj atingas la kategorion de veraj luksaĵoj, la esperantisto neniam eskapas el sia socia determino.



prezidanto de latin-amerika lando parolas en Svisio angle?

Mondproblemoj proprahaŭte

Tio ĉi ne signifas ke esperantisto estas fremda al la zorgoj de la internacia vivo. Tute male, se konsideri lian daŭran kontakton kun personoj el la tuta mondo, lian aliron al la kulturo de ĉiu ajn popolo kaj, dekomence, lian intereson partopreni sur egaleca nivelo en la internacia medio — kio unuavice igis lin esperantistiĝi —, esperantisto estas en la unua vico por senti je propra haŭto la mondajn problemojn.

De la valut-kontrolo — vera obstaklo por aĉeti librojn eksterlande kaj kotizi ĉe internaciaj organizaĵoj —

Ne sur la unuaj paĝoj

Sed foliumante la ĵurnalojn esperantisto neniam vidas sur la unuaj paĝoj tiun temon kiu troviĝas en la centro de liaj streboj: la lingvo-problemon. Kvazaŭ ĝi tute ne ekzistus. Kaj tio, por diri milde, kreas la kompleksan senton ke li situas margene de la grandaj fluoj de la nuntempa vivo.

Kial, demandas sin nia esperantisto, neniam oni informas en kiu lingvo oni intertraktas pri libera komerco en Norda Ameriko? Kiel povas ekzisti politika estaĵo kiel Eŭropa Unio kun pli ol dek lingvoj? Kiel dialogas israelanoj kaj palestinanoj? En kiu lingvo povas sin kompreni rusoj kaj ĉeĉenoj?

Maksimume, la lingvo-problemon oni konsideras kiel parton de la pli larĝa problemo de homaj rajtoj. La plej grava atingo estas la ĝenerala agnosko ke ĉiu popolo rajtas konservi sian lingvon, ĉiam konsideratan kiel parto de ĝiaj kulturaj tradicioj. T. e. la rajto uzi la patrinan lingvon estas nur implicita en la neceso protekti la kulturen diversecon planedan.

Nu, dum la e-isto ne komprenas kial oni flankenigas problemon por li tiom gravan, por eksteruloj simple ne ekzistas la problemo. Eĉ pli malbone: se ĝi ekzistas, ĝi estas “jam solvita”, ĉar la tuta mondo parolas la anglan, ĉu ne? Kiun problemon, do, intencas solvi Esperanto?

Pro tio, prezenti la ideon ke la E-movado celas nur solvi la problemon de la lingvodiverseco kondukas neeviteble en tiun sakstraton. Ni do devas jene direkti niajn klopodojn: enigi E-on en pli larĝan perspektivon, eltiri ĝin el la konkurado de la lingvaj lernejoj kaj meti ĝin en la bazon de la grandaj debatoj de la nuntempa mondo. Simplas la rezonado: manke de komuna lingvo — demokratia, kiu ne donas avantaĝon al iu el la partoprenantoj — ĉiu dialogo havas difekton dekomencon.

Jorge Luis Gutiérrez · Meksiko

La aŭtoro (1953), ĵurnalisto, prizorgas la TTT-ejon de Meksika E-Federacio.

Notu bone

UK 2001: KONGRESO DE DIALOGO

Laŭ decido de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, la jaro 2001 estos Internacia Jaro de Dialogo inter Civilizoj. La Loka

Kongresa Komitato de la 86-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo proponis al la estraro de UEA dediĉi la temon de la kongreso al tiu Internacia Jaro.

La estraro unuanime akceptis la proponon de LKK kaj vortumis la temon kiel “Kulturo de dialogo — Dialogo inter kulturoj”.

ĈIAM PLI DA SUBSKRIBOJ AL LA PRAGA MANIFESTO

Post ricevo de 487 subskriboj el

Pakistano (vidu p. 78), la subskribaj apogoj al la Manifesto de Prago, ĉi tiu ĉefa dokumento de la moderna Esperanto-movado, nombris jam 13 437 la 31-an de marto. La Manifesto estis ĵus tradukita en la lingvojn manipura kaj boa, kiujn oni parolas en la norda parto de Hinda Unio.

Pliajn subskribojn oni povas daŭre sendi al UEA, de kiu eblas peti subskrib-formularojn, sed sian apogon al la Manifesto eblas anonci ankaŭ per ordinara letero.

La pasintjara ducento

Aleksander Korĵenkov ĉiujare revuas en *La Ondo de Esperanto* la Esperantan libroproduktadon. Jen kelkaj el liaj konkludoj.



"Laste aperis" de ĉi tiu revuo estas listo de la libroj ekvenditaj de UEA en la koncerna jaro. Tial mankas en ĝi titoloj aperintaj sed ne senditaj al la Libroservo de UEA; aliflanke registriĝas libroj pli frue eldonitaj. Tamen la rubriko ja rivelas tendencojn.

En 1999 estis registritaj 208 libroj (en 1997: 273; 1998: 208), kun suma

paĝnombro 24 460 (1997: 27 727; 1998: 28 769) kaj meza paĝokvanto 117 (1997: 102; 1998: 138). Inter ili estis 28 lerniloj, vortaroj k.s.; 23 verkoj de originala kaj 46 de traduka beletro; 19 planlingvistikaj aŭ esperantologiaj; 32 E-kulturaj aŭ movadaj; 9 klaseblas al "politiko, filozofio, historio", 25 al "scienco, tekniko, terminaroj", 13 al religio kaj 13 al ceteraj temoj.

Nia libromerkato stabilas: ĉiujare pli ol 100 eldonantoj produktas iom pli ol 200 librojn. UK kutime stimulas eldonemon: tial en 1998 Francio antaŭis Germanion, sed en la jaro de la Berlina UK atutis jam ĉi-lastata, kun 23 libroj. Sekvas Italio (20), Nederlando (19), Ruslando (16), Francio (15), Pollando (14).

Plej aktive eldonadis UEA: ne nur pasintjare 14 librojn, sed ankaŭ tra 1992-99, 56 titolojn. La sinsekvo por 1999:

1. UEA 14;
2. Impeto (Ruslando) 7;
- 3-6. Al-fab-et-o (Svedio), CoEdEs (Italio), Flandra E-Ligo kaj Sezonoj (Ruslando) po 6.

Por 1992-99 validas jena sinsekvo:

1. UEA 56;
2. Fonto (Brazilo) 46;
3. Flandra E-Ligo 40;
4. Ĉina E-Eldonejo 35;
5. Unuigo Franca por E-o 33;
- 6-7. Sezonoj (Ruslando) kaj Pro Esperanto (Aŭstrio) po 32;
8. Impeto (Ruslando) 30;
- 9-10. Iltis (Germanio) kaj Al-fab-et-o (Svedio) po 25. ★

Laboro grava... senfina

Kie trovi relative kompletan inventaron de monografioj, studoj, artikoloj E-rilataj? Respondas Humphrey Tonkin, volontula ĉefbibliografo jam 20 jarojn.



Asocio pri Modernaj Lingvoj (Modern Language Association, MLA) en Usono ĉiujare eldonas sian bibliografion kun sekcioj pri literaturo, lingvo kaj folkloro. Tiu pri 1998 aperis sur iom pli ol 3500 dense presitaj paĝoj. Ĝian ĉapitron pri "help-lingvoj kaj internaciaj lingvoj" prizorgis mi kiel "ĉefbibliografo", kun helpo de kolego Detlev Blanke. Ni enlistigis en tiu ĉapitro 327 verkojn en aŭ pri Esperanto, kiuj publikigis plejparte en 1998. (Kelkaj aperis pli frue sed ne estis tiam notitaj.)

La kompilaĵo kovras verkojn pri la lingvistikaj kaj socilingvistikaj aspektoj de la koncernaj lingvaj fenomenoj. Ni interpretas la nocion de socilingvistiko iom vaste, tiel ke ĝi enhavu ankaŭ verkojn pri la Esperanto-komunumo. La praktiko de MLA tamen estas tia

ke nek pedagogiaj verkoj nek recenzoj estas registrataj.

Notinde: pluraj artikoloj aperis en fakaj revuoj nacilingvaj, ekzemple en *Sitzungsberichte der Leibniz-Sozietät*, *Language Problems and Language Planning*, *Waiguoyu* (Ĉinio), *Human-kybernetik*, *Babylonia* (Svislando), *Terminology Standardization and Information Technology*, *Asiatische Studien* (Svislando) kaj *Rassegna Italiana di Linguistica Applicata*. Tio estas salutinda, sed ne sufiĉa por klare montri ke Esperanto estas fenomeno studata kaj studinda inter fakuloj.

Inter la verkoj aperintaj ĉe neesperantistaj eldonejoj aparte menciindas la granda libro *Interlinguistik* de Alicja Sakaguchi (vidu p. 75) kaj artikolaro redaktita de mi mem, *Esperanto, Interlinguistics, and Planned Language*.


Enlistigis nove aperintaj E-vortaroj de la lingvoj portugala, ĉeĥa, ukraina, hinda angla kaj itala, kaj la 13-voluma, 13-lingva *Fervoja terminaro*.

Krom la menciitaj 327 verkoj, pli ol 40 titoloj troviĝas ekster la ĉapitro "helplingvoj kaj internaciaj lingvoj". Ekzemple, literatura kritiko estas dividata laŭnacie: jen kial tri artikoloj pri verkoj de Marjorie Boulton enlistigis sub "modernaj anglaj verkistoj", kaj tiuj pri William Auld sub la skotaj.

Elektronika versio de la bibliografio, en akumula formo de 1963 (kun miloj da verkoj en kaj pri E-o), atingebblas pere de abonantaj bibliotekoj tra la mondo, ĉu rete ĉu kompakt-diske.

Kvankam Biblioteko Hodler de UEA estas nemalhavebla informfonto por kompili la MLA-bibliografion, ĝi ne sufiĉas en si mem. Laboro de bibliografo ja neniam estas finita. Tial bonvenas ĉies helpo por trovi gravajn publikigaĵojn rilatajn al Esperanto, precipe en lingvoj malpli vaste konataj. Se eble, sendu kopion de la kompleta teksto kaj resumon de la enhavo al:

Humphrey Tonkin, 279 Ridgewood Road, West Hartford CT 06107, Usono;
 ☎+1/860/561-52-19; ✉tonkin@mail.hartford.edu



Recenzoj

Beletra

Kiel montara rivero

Antologio de la serba poezio (1200-2000). Ĉefred. Srdj Arandjelović (1920-96). Red. Zlatoje Martinov, Greta Stoll, Nedeljka Subotić, Marko Petrović. Beograd: Serbia E-Ligo, 1998. 499p. 25cm. Bind. € 27,00.

La tradukita Esperanto-literaturo estas riĉa je antologioj. Ne eblas eĉ menci iujn poeziajn kaj prozajn antologiojn, kiuj prezentas diversajn naciajn literaturojn.

Nun *Antologio de la serba poezio* eniris la trezorejon de la Esperanta tradukita literaturo. La volumo estas grandformata, tre ampleksa kaj impona. Ĝia kompilinto kaj ĉefredaktoro Srdj Arandjelović dediĉis grandan parton el sia vivo kaj multe da energio, kapablo, ardo kaj amo por kompili kaj redakti tiun ĉi grandiozan verkon. La antologio prezentas la serban poezion de la 13-a ĝis la 20-a jarcento. Ĝi estas fenestro al la riĉa, multkolora kaj magia serba poezio.

La antologio enhavas kvin partojn. La unua ampleksas la mezepokan poezion, el kies reprezentantoj elstaras Stefan Lazarević — ŝtatestro, kiu helpadis multajn religiajn instituciojn kaj subtenis literaturistojn. Jefimija Mrnjavčević estis



La ĉefredaktoro, Srdj Arandjelović, dediĉis la antologion al sia edzino kaj kunlaboranto, Margarethe-Greta Stoll.

la unua serba poetino. Ŝi devenis de nobelula familio kaj dediĉis unu el siaj poemoj al duko Lazaro. En tiun ĉi parton eniris poemoj, kiuj spegulas la suferojn kaj la tragikan sorton de la serba popolo dum la turka regado. Unu el ili estas *Preĝo al la dormanta Sinjoro* de la serba patriarko Arsenije Ĉarnojević, kiu havis la historian mision gvidi serbojn fuĝantajn el suda Serbio al la nordo pro la teroro de turkoj.

La dua parto prezentas la klasikismon kaj romantismon en la serba poezio. Unu el la plej grandaj poetoj dum tiu ĉi periodo estis Petar Petrović Njegoš. Li ĉerpis el la riĉa pola poezio kaj kreis valorajn originalajn

verkojn. Lia poemo *La montara krono* prezentas la vivon de la serba popolo dum tiu epoko. Elstaras alia genia poeto, Laza Kostić, dank' al kies talento la serba poezio atingis la nivelon de la moderna eŭropa poezio.

La tria parto enhavas verkojn de la poetoj de realismo, simbolismo kaj postsimbolismo. Oni nepre devas menci la nomojn de Jovan Dučić, Aleksa Šantić kaj Milan Rakić. Grandparte ili studis en fremdlando kaj riĉigis la serban literaturon per originalaj temoj, motivoj kaj brilaj poeziaj esprimoj.

Srdj Arandjelović havis la kuraĝon prezenti ankaŭ la plej lastatempan generacion de serbaj poetoj. En la kvara kaj kvina partoj de la antologio li aperigis poemojn de Desanka Maksimović, Vasko Popa, Vasa Pavković kaj de Slobodan Vuksanović, kiu

naskiĝis en 1965.

En tiu ĉi grandioza laboro partoprenis 25 tradukistoj, inter kiuj multaj konataj esperantistoj, kiel Margarethe-Greta Stoll, Jovan Zarković, Tibor Sekelj, Emilija Lapenna, Simo Milojević, Božidar Vančik, Vesna Skaljer-Race kaj aliaj. Bedaŭrinde la tradukoj ne ĉiam estas altnivelaj, sed kompreneble la tasko estis ege malfacila.

La antologio enhavas biografiojn de la poetoj, de la tradukintoj kaj kunlaborintoj, kaj klarigojn, per kiuj la legantoj povas orientiĝi en la aro da nomoj de urboj kaj historiaj lokoj. *Antologio de la serba poezio* ne nur estas verko bezonata de literatura vidpunkto: ĝi ankaŭ prezentas popolon kun grandega kulturo, malfacila historia sorto kaj forto, simila al montara rivero, kiel poezias Aleksa Šantić en la fina poemo *Ni konas la destinton*.

Julian Modest · Bulgario

LEGOLIBRO EL KANADO

LITO APUD LA FENESTRO.

Betty Salt (1907-1994).

Rotterdam: UEA, 1999. 111p.

Prezo: € 4,80.

Simplaj rakontoj, teatraĵetoj kaj poemoj, kun kelkaj tradukoj el la kanada literaturo. Stile belaj, ili facile kaptas ankaŭ la malpli spertan leganton, dank' al relative facila lingvaĵo. Ankaŭ pro la mallongeco de la plej multaj tekstoj la libro bone taŭgas kiel progresiga legaĵo.



EVENTOJ La plej ofta E-gazeto!
pk. 87, HU-1675 Budapest, Hungario

Por ne perdi la fadenon

Plansprache und Phraseologie. Empirische Untersuchungen zu reproduziertem Sprachmaterial im Esperanto. Sabine Fiedler (1957). Frankfurt am Main: Peter Lang, 1999. 444p. 21cm. € 78,00.

Gis nun mankas en Esperanto speciala vortaro reflektanta la uzadon de frazeologiaĵoj en la praktiko. La *Proverbaro* kompreneble ja nur proponas al estonta parolantaro pli ol 2500 proverbojn, parolturnojn, ĝemelajn formulojn ktp, plejparte konscie kreitajn laŭ etnolingvaj modeloj. La prestiĝa PIV citas apud la Zamenhofajn ankaŭ pli novajn frazeologiajn unuojn, ekzemple el la Esperanto-movado, sed ofte sen mencio de la stilnivo laŭ sen konfirmo el la skriba aŭ buŝa lingvoapliko.

La esploro de Fiedler liveras multe da observoj kaj konstatoj necesaj por konturi



deziran kompendion pri E-frazeologiaĵoj, tiom gravaj por la prijuĝo de nia planlingvo kiel vere evoluinta interhoma komunikilo.

Etnaj lingvoj posedas preskaŭ nesupervideblan kvanton da frazeologiaj unuoj de plej diversaj kategorioj. En Esperanto, unuflanke, ekzistas pli modesta amaso da ili kaj ankaŭ laŭ strukturaj variantoj la planlingvo estas pli malriĉa, aliflanke la Esperanta frazeologio disponas je rimarkinda poezia trajtaro kaŭzita de la specifa lingva fleksebleco.

Fiedler laŭkvante demonstras la konsiston de la frazeologiaj unuoj kaj la gradon de ilia komprenateco en la parolo: La plej

oftan strukturon reprezentas *perdi la fadenon* (verbo + substantiva grupo); plej ofte aperas nomoj de korpopartoj kiel *mano*, *kapo*, *okulo*; nur malpli ol triono de la elektitaj frazeologiaĵoj estas trafe interpretata de internacia aro da e-istoj. (La plej pintan konatecon akiris *eterna komencanto*).

Koncerne pliprofundigon de la lingvo-posedo kaj parol-alproprigo, tre instigaj por nia kvazaŭ diaspore vivanta komunumo estas jenaj konkludoj:

1. Rilate al lingva planado ekzistas ne principaj, nur kvantaj diferencoj inter etnaj lingvoj kaj planlingvo.

2. La obeado al frazeologia normo en la planlingvo ne estas tiom strikta kiel en etnaj lingvoj.

3. La reliefigo de frazeologiaj unuoj estas unu el la karakterizaj tendencoj de la evoluo de la planlingvo.

4. Por regi Esperanton en la vera senco de la vorto puraj lingvokonaj ne sufiĉas. Lingvolernado devas kontinue pliriĉigi el kulturinternaj fenomenoj.

Do, ek al la librovendejo, kaj *ne manĝu herbon survoje!*

Till-Dietrich Dahlenburg · Germanio

Mene bal buki bal*

Menade bal pŭki bal. Festlibro por la 50a naskiĝ-tago de Reinhard Haupenthal. Saarbrücken: Iltis, 1998. 487p. 21cm. Bind. € 61,50.

Malgraŭ ke la volumo estas nomita en Volapuko (devizo de ties kreinto Johann M. Schleyer: "Al unu homaro unu lingvon"), ni ne trovos en ĝi eĉ unu artikolon Volapuke. Plejparto estas en Esperanto, malpli en la germana, kaj unu artikolo en la angla. La verko estas dediĉita al la germana e-isto, esperantologo kaj interlingvisto Reinhard Haupenthal.

La artikolaro konsistas esence el tri partoj: esperantologia, interlingvistika kaj "Miscelaneoj" (diversaĵoj). Plej ampleksas la unua (pp. 19-366), kie envicigas tekstoj diversenhavaj. A. Albault skribas pri duoblaj konsonantoj en E-o, konkludante: "Post Zamenhof la nombro de vortoj entenantaj duoblajn konsonantojn plialtiĝis. Ĝi daŭre pligrandiĝos (...). Mi konsilus ilin nepre uzadi (...) ankaŭ en novaj kulturaj terminoj" (p. 43). E. de Kock ekzamenas traktajn de elizio en Esperanto. G. Mattos traktas la problemon de la pola kaj Volapuka influoj je la lingvoprojekto Lingwe Uniwer-

sala kaj je Esperanto mem. (La rusa lingvo, patrino por Zamenhof, influis E-on pli ol iu alia slava lingvo — problemo pri kiu jam en 1984 B. Kolker defendis doktoran disertacion.) A. Csizsár pri-skribas la vidpunkton de Kalocsay pri "ata-ita"; laŭ ŝi, Kalocsay fine konkludis ke "el atistoj fari itistojn estas preskaŭ neeble". C. Minnaja raportas pri sia kompilado de granda itala-Esperanta vortaro, klarigante pri la vortaraj funkcioj registra, normiga kaj propona. Noteto de E. Vilborg tuŝetas internaciajn sciencajn terminojn en E-o.

Kelkaj artikoloj estas dediĉitaj al aspektoj de la E-movada historio en Svislando, Hungario, Latvio, Estonio, Ĉeĥio, kaj al E-periodaĵoj, ekz. *Dia Regno*, *La Mondlingvisto* kaj *La Nica Literatura Revuo*. Pluraj tekstoj rilatas al la E-literaturo: S. Hawkes-Teeple analizas la poezion de William Auld kaj Baldur Ragnarsson, Li



Ŝijun skribas pri E-tradukoj el la ĉina literaturo, V. Novobilský detale prilumas la tradukan agadon de la ĉeĥo Tomáš Pumpr, B. Ragnarsson parolas pri siaj tradukoj el la antikva islanda literaturo.

En dua parto, "Interlingvistiko", ni trovas nur ses artikolojn, el kiuj kvar rilatas al Volapuko.

Ne estas klare kial publikiĝis la tekstoj de "Miscelaneoj" (pp. 429-461), sen rilato al interlingvistiko. Bedaŭrinde, la libro ŝajne ne havas redaktoron, kio influas la nivelon de ĝiaj partoj. Strange impresas ke la teksto de S. Hawkes-Teeple estas dediĉita al Fr. Walter Ong kaj tiu de G. Mattos al la memoro de Waringhien, dum la tuta libro omaĝas al la sufiĉe frue jubileanta (50-jara en 1995) Reinhard Haupenthal.

Ĉiu menciita artikolo aldonas sian kontribuon al la evoluo de la esperantologio kaj interlingvistiko. Tial la libro povas esti rekomendata al legantoj kiuj interesiĝas pri internaci-lingva komunikado.

Aleksandr D. Duliĉenko · Estonio

* "Al unu homo unu libron", volapuke.

Laste aperis



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!

Aniario. *Esperanto-teksto aranĝita por scena prezento.* Harry Martinson (1904-78). Aranĝis Gunnar Gällmo. El la sveda trad. William Auld kaj Bertil Nilsson. Högsby: Ulekso, 1997. 22p. 21cm. Adapto, furorinta sur E-scenejoj ekde 1987, de moderna epopeo. € 7,80.

Bestoj en nia domo. Zdravka Metz (1952). Montrealo: E-Societo Kebekia, 1999. 58p. ISBN 2 9806246 0 8. 22cm. 15 rakontoj el la vivo de internacia E-familio, kiujn unue aŭskultis la gefiloj de la aŭtorino. € 7,80.

Birdoj sen flugiloj (1938). Dan Tirinaro (1910-44). En la korean trad. Kim Uson, Kim Yocho. Seulo: Segimunhak, 1999. 214p. 22cm. Dulingva: E-korea. 52 poemoj elektitaj el la originala poemaro *La liberpoeto* (vidu marto, p. 55). € 16,20.

Bona arbo, La (1964). Shel Silverstein (1930-99). El la angla trad. Victor Sadler. Zagreb: Izvori, 1999. 56p. ISBN 953 6157 99 3. 22cm. Ilus. Bind. Kromkovrilo. Kortuŝa fablo pri ama sinofero. € 9,90. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Ĉevalo de Motizuki, La. *Korusa suito* (1988). Ōkawa Essei (1930-88), Miyazawa Hazime (1932). Muziko de Miki Minoru (1930). El la japana trad. Konisi Gaku. Tokio: Japana E-Instituto, 1999. 95p. ISBN 4 88887 015 2. 30cm. Kun muziknotoj. Pri profunda amo inter princino kaj ĉevalo. € 12,00.

Cxu Esperanto postvivos la jaron 2045? Tazio Carlevaro (1945). Bellinzona: Hans Dubois, 2000 (2-a eld., reviziita kaj pligrandigita). 61p. ISBN 88 87282 03 X. 30cm. Negativa analizo pri la pluiviv-ŝancoj de nia lingvo en Svislando kaj aliloke. Iksoj anstataŭas ĉapelojn. € 6,90.

Docteur Esperanto (1859-1917), Le (1959). Maria Ziolkowska [Ziółkowska]. El Esperanta elpoligo de Isaj Dratwer tradukis André Ribot. Beauville: Cercle amical espér-

antiste de l'Agenais, 2000 (2-a eld.). 164p. 15cm. Franclingva. Romano pri la vivo de Zamenhof. € 3,90.

tristo, okaze de la centjariĝo de la E-teatro. € 7,80.

Konversacia Esperanto-kurso (1937). [Ferenc] Szilágyi (1895-1967). [Tehran:] Atai El-donejo / Irana E-Asocio [1994]. 64p. 24cm. Represo de klasika lernilo. € 4,80.

Meissen, la naskiĝejo de homeopatio. *Oberĝo da homeopatia.* Red. Izaac Carneiro Soares. Trad. Edméa Marturano Villela. Ribeirão Preto: Muzeo de Homeopatio Abrahão Brickmann, 1999. 19p. 28cm. Ilus. Dulingva: E-portugala. Pri la naskiĝurbo de Samuel Hahnemann, la fondinto de homeopatio. € 1,80.

Modernaj rimedoj de komunikado. *Terminologiaj problemoj de aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko. Scienco kaj tekniko ĝenerale.* Red. Miroslav Malovec. Dobřichovice: Kava-Pech, 1999. 193p. ISBN 80 85853 46 9. 20cm. 24 kontribuaj prezentitaj dum kolokvo pri la tri temaroj indikitaj (Prago, 1998). € 16,50.


Nomoj. Johan Hammond Rosbach (1921). Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1999. 73p. ISBN 90 71205 83 5. 21cm. Originala novelaro de unu el niaj plej bonaj przistoj. € 7,80.

Omaĝo al Aldecoa. Recordanto a Aldecoa/gogoan. Ignacio Aldecoa (1925-69). El la hispana al E-o trad. Miguel Fernández, István Ertl. Vitoria-Gasteiz: Alava E-Asocio, 1999. 69p. 19cm. Trilingva: E-eŭska-hispana. Du noveloj de "rakontisto ĝismodola". € 3,00.

Oportuna vortaro de ordinara Esperanto (1969). Vilho Setälä (1892-1985). Helsinki: Fondumo Esperanto, 1974 (2-a, senŝanĝa eldono). 96p. 22cm. Unulingva vortaro kun simplaj difinoj kaj multaj bildetoj. € 5,40.

Palaco, La (1970). Wiesław Myśliwski (1932). El la pola trad. Tomasz Chmielik. Svidniko: Libro-Mondo, 1992. 106p. 30cm. Romano de vilaĝema verkisto: Ĉu, post la dua mondmilito, paŝtisto Jakobo sukcesos fariĝi grandsinjoro? € 12,00.

» p. 79



La diskoj *Dolceamar* kaj *Kore* kompletigas Kolekton 2000, dum "verdaj signaloj" venas el Brazilo kaj el aliloke.

Esperanto in Leipzig und Umgebung 1945-1991. *Heft 3: Gruppenarbeit; Heft 4: Öffentlichkeitsarbeit.* Komp. Rolf Beau. Althen: DEB Landesverband Sachsen, 1999. 225+187p. 21cm. Germanlingva. Historio de la E-movado en la Lepsika regiono. Volumoj 3-4 el 6-parta komentita dokumentaro. € 18,90.

Esperanto: Je vraagt maar. Claude Piron (1931). Adaptis Paul Kempeneers. Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1999 (5-a, ĝisdatigita eld.). 24p. ISBN 90 71205 84 3. 21cm. Nederlandlingva. Respondoj al oftaj demandoj pri Esperanto. € 1,50.

Interlinguistik. *Gegenstand, Ziele, Aufgaben, Methoden.* Alicja Sakaguchi (1954). Frankfurt am Main: Peter Lang, 1998. 492p. ISBN 3 631 31387 21cm. Germanlingva. Detala studo pri la temo, celo, taskoj kaj metodoj de interlingvistiko. € 78,90.

Jubileo, La. Zofia Banet-Fornalowa (1929) kaj Harold Brown. Högsby: Ulekso, 1996. 31p. 21cm. Omaĝo al ĉiuj Esperantaj tea-

Kaj plue...



EKOLOGIO: Kunkompoŝtu

Studsemajno en Londerzeel (Belgio, 1-7 jul.) temos pri 100%-e natura, biologia kompoŝtado. La kosto, ĉion inkluzivanta, estas nur € 25, kaj ne pagas homoj el nepagipovaj landoj. Estas ŝanco por parta subvencio de vojaĝkostoj. Informas Flandra E-Junulara Asocio, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen; lode@fel.esperanto.be.

JUNULARO: Poloj reaktivas

Instigite de ideoj el Mezeŭropa E-ista Junulara Konferenco (Bydgoszcz, 25-28 okt. '99), trideko da gejunuloj el tuta Pollando kunvenis (28-30 jan.) en la sama urbo por reaktivigi sian organizaĵon Pola E-Junularo. Naskiĝis agadprogramo kaj regularo, elektigis estraro (prezidas Aneta Małgor-

zata Będkowska). La organo de PEJ iĝis *Trampo*, jam ekzistanta kluba eldonaĵo. Adreso: PEJ, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz; andreo@rubikon.net.pl. (Eventoj)



TURISMO: Mondpaca palaco
Aperis 4-paĝa, kolora informilo pri la Episkopa palaco (Monda Centro por la Paco) en Verdun (Francio). Petebla ĉe Centre Mondial de la paix, Place Monseigneur Ginisty, FR-55100 Verdun; cempaix@wanadoo.fr.

KATOLIKOJ: Kune en Rimini

La 53-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo E-ista, kun jubilea E-pilgrimo, okazos de la 2-a ĝis la 8-a de septembro en Rimini (Italio). Informoj: IKUE, Via di Porta Fabbrica 15, IT-00165 Roma RM, Italio; [+39/06/632-839](tel:+3906632839); c.sarandrea@agora.stm.it.

• Ŝanĝiĝis la dato de la 4-a Junulara Ekumena E-Tendaro (Taizé, Francio; vidu marto, p. 51): de 13-20 aŭg. al 6-13 aŭg. (Dia Regno)

RADIO: Zurika alternativo

En alternativa radio de Zuriko, LoRa (<http://www.lora.ch>; loke: 97,5 Mhz), "Esperanto sonas poeme" ĉiuĵaŭde (15.30-16.00), en aŭtora programo de Jan Stanisław Skorupski. Ĉiunomente aŭdebla dum monato, en Interreta arkivejo.

TERMINOLOGIO: Retaj opoj

• Funkcias diskutlisto pri terminologiaj demandoj sub <http://www.eGroups.com/group/terminologio-/>.



• Unua versio de Astronomia Terminaro, kun "precipe sed ne sole" PIV-aj terminoj, troveblas ĉe Astronomia E-Klubo (http://sr2.xoom.com/astro_esp/).

TUT-TERA TEKSAĴO: UEA PLI ALLOGA

Dank' al monatoj da volontula laboro de la profesia retpaĝar-fasonisto Adrian Hall (Aŭstralio), la 15-an de marto ekaperis jena bonveniga paĝo de UEA ĉe <http://www.uea.org>. La elmontron de tekstoj en diversaj formatoj ebligas programo de Bertilo Wennergren. Laŭ atesto de gratul-mesaĝoj, la nuna UEA-paĝaro montriĝas pli bela, pli profesia kaj praktika. Ĉe la paĝaro eblas ankaŭ aliri la retbutikon de UEA, realigitan dank' al volontula helpo de Michiel Meeuwissen (Nederlando).





ĈEĤIO: Lančov-a relanĉo

En tri partoj, je tri niveloj okazos E-kursoj en Lančov kadre de la 48-a Somera E-Tendaro: 2-15 julio, 16-29 julio, 30 julio-12 aŭg. Adreso: Esperanto-klubo de Třebíč, CZ-67401 Třebíč, Ĉeĥio.

KANADO: Elekto, eksigo

En ĵus komencita dujara deĵorperiodo de la estraro de Kanada E-Asocio, prezidanto restas Ciprian Jauca (✉esperanto@canada.com); la asocian organon Lumo redaktos Geoffrey Greatrex (✉greatrex@is.dal.ca). Presilo kiun KEA aĉetis antaŭ 20 jaroj por helpi la eldonejon Esperanto Press de Rüdiger Eichholz, estas nun vendota. (Kontaktu Wally du Temple, ✉dutemple@mail.islandnet.com.) Antaŭa KEA-estrarano, Pierre



Komplezo de S. Aragaj

HISPANIO: Esperanto-monumento

Castelldefels (Barcelono) ekhavis la 7-an de dec. modernan monumenton al Esperanto, fare de Clemente Ochoa, sur placo Esperanto. La inaŭguron ĉeestis urbestro Agustín Marina. (S. Aragaj)

GERMANIO: Nova E-Centro?

La arkivisto de Germana E-Asocio (GEA), Johano Pachter, private aĉetis nefunkciantan kinoteatron en Weferlingen (Saksio-Anhaltio), kun salono, koktelejo kaj multaj kromĉambretoj. La ejo povos utili, krom kiel deponejo por la duoblaĵoj de la GEA-arkivo, kiel okaz-loko de kulturaj eventoj, kun tranokteblo por 13 personoj. Nia informfonto, *Berlina Informilo*, salutas ke la esperantistaro "per tiu granda objekto enorme pliriĉiĝis kaj povos ĝui (...) novan E-kultur-centron".


Savoie, estas eksigita el la KEA-membreco, tial ke li dissendis anglalingvan leteron kun asertoj juĝeblaj kiel rasismaj kaj instigantaj al rasisme bazita perforto.

NEPALO: E-ĉeesto ĉe Everesto

En januaro Mukunda Pathik kaj Emin Baro, nepala resp. novzelanda esperantistoj, piediris ekde la urbo Lukla ĝis la baza kampadejo kiu troviĝas sub la plej alta monto de la mondo, Everesto. Atinginte la bazon, ili kune "levis grandan Esperantan flagon" sub Everesto. (Montejo)

UK Ĝis la 3-a de apr. al la Tel-Aviva UK (25 jul.-1 aŭg. 2000) aliĝis 975 personoj el 51 landoj.

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vidu en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

LERNANTO, 30-JARA POŝT-ISTO,

deziras korespondi. Intereso: muziko, vojaĝado, lingvoj. S-ro Lila Baniya, GPO Box 12326, Kathmandu, Nepalo.

PRI TERMINAROJ AŬ TEKSTOJ MIKOLOGIAJ

en Esperanto serĉas informojn Giorgio Bronzetti (✉bronzetti@vega.chieti.com), por projekto pri lernolibro.

10-JARA KNABINO

emas korespondi tutmonde. Ŝatas muzikon, sporton, komputilon, apartenas al pupteatra grupo. Hilda Martha González Gómez, Calle 19, No 59, Entre 25 y 8, Reparto Sanfield, CU-80400 Holguín, Kubo.

NI DEZIRAS MALFERMI E-KLUBON

en mezlernejo kaj korespondi. Adreso: Sc. Zlobozia, RO-5868 Com. Grânicesti, jud. Suceava, Rumanio.

KORESPONDI DEZIRAS

pri interkonsentotaj temoj s-ro Olaf Seek (nask. 1960), faklaboristo pri konstruado: A.-Milarch-Str. 16, DE-17033 Neubrandenburg, Germanio.

EKSTERLANDAN INSTRUISTON

por konversacia nivelo serĉas E-ligo de Resp. Serba en Bosnio-Hercegovino (p. f. 335, BA-78000 Banja Luka, RS; ✉mvrhovac@urcbl. urc.bl.ac.yu) por Somera E-lernejo (14-22 julio). Vojaĝbileto kaj restado pagotaj de E-Ligo.

29-JARA GIMNAZIA INSTRUISTINO

deziregas korespondi tutmonde, per ordinara aŭ reta

poŝto, precipe pri kulturo, vojaĝo, filmado, literaturo, kutimoj. Jerneja Jezernik, Parizlje 15, SI-3314 Braslovce, Slovenio; ✉jerneja.jezernik@email.si.

VOLONTULON KAPABLAN INSTRUI ESPERANTON

rekta-metode invitas Asocio de E-istoj de Taĝikio: Ŝukurov Firdaus, Glavpoĉta, a.k. 135, TJ-734000 Duŝanbe, Taĝikio; ✉firdaus@cada.tajik.net.

KOMENCANTO DEZIRAS KORESPONDI

tutmonde. Saulo Zacarias Saraiva da Silva, Rua Espírito Santo, 1414/103, BR-36016-200 Juiz de Fora, MG, Brazilo; ✉saulozacarias@yahoo.com.

INSTRUU ĈE LA GRANDA MURO


E-on kaj la anglan, 15 lecionojn semajne dum jaro ĉe Beijing Konkorda Universitato. Senpagaj loĝado, manĝado. Monata salajro 1500 juanoj (ĉ. 200 USD). Alflugo ne repagota. Kontaktu Xie Longfei; ☎/✉+86/1/89-70-81-73; ✉Esperanto@263.net.

VOJAĜ-PRELEGAS

ĝis fine de junio tra Francio, Germanio k.a., pri scienco kaj sano, s-ro SHEN Chengru kaj s-ino WANG Yuchun (Ĉinio). Invitontoj kontaktu Marie-France Conde-Rey, 54, terrasses d' Aegyptos, 3, rue d'Alexandrie, FR-16000 Angoulême, Francio; ☎/✉+33/5/45-61-69-25.

MI SINCERE DANKAS

la bonajn geamikojn pro la multaj kondolencoj pro la morto de mia patro. Franĵo Veuthey.



FRANCIO: Tenise, bretone

Inter 5 kaj 13 feb., promesplenaj junaj tenisistoj el 20 landoj ariĝis en Marcq-en-Barœul (apud Lille) por turniro. Dum momentoj de malstreĉo, ili povis sekvi en la oficiala turnira ĵurnaleto E-lecionojn zorge de Michel Dechy kaj Thierry Sterck, fakte felietonon kun tenisistaj dialogoj. En kursfina konkurso kvin gajnintoj ricevis la bildstrion *La nigra insulo*. (Norda Gazeto)

• La bretona revuo *Le Peuple Breton* dediĉis du paĝojn en januaro al Esperanto, per tekstoj de

PIRON: RETA ĈEESTO

Pliriĉiĝas la TTT-paĝo de Claude Piron (http://www.geocities.com/c_piron/), kies ekziston ni signalis en februaro (p. 29). En sia plej freŝa anglalingva verketo, "Ĉi tiuj teranoj estas veraj masohistoj", Piron igas eksterteranon reagi al lingvisto Robert Trammell, kiu opiniis en la taggazeto *USA Today* (vidu marto, p. 57) ke Esperanto "ne populariĝis pro tio ke ĝin la parolanto ĉiam devas lerni aldone al sia denaska, praktika lingvo – ekstraĵo." La "eksterterano" komentas: "Se ĝi estas komuna lingvo por internacia komunikado, kiel oni povus ĝin uzi ne lerninte ĝin aldone al la denaska lingvo? Pura stultajo!"

Daniel Houguet kaj por-bretona aktivulo Per Denez. (H. Masson)



karta kaj anonca kampanjo de la asocio (vidu feb., p. 39). (FEN-X)

PAKISTANO: PakEsA sukcesa

La taggazetoj *Osak* kaj *Markaz* ofte mencias Esperanton, dank' al la konata lingvisto Muztar Abbasi, ĉefgvidanto de la landa asocio PakEsA. Pasintjare la religia revuo *Naĝat* publikigis dum 4 monatoj korespondajn Esperanto-lecionojn. Manifesto de Prago estis tradukita en la urduan lingvon. (*Esperanto – Universala Lingvo*)

• Fine de marto la CO de UEA ricevis 487 subskribojn al la Manifesto de Prago, kolektitajn de PakEsA. Pasintjare la asocio jam sendis 719 subskribojn.

NEDERLANDO: Pli da petoj

Ineke Emmelkamp, sekretario de la landa asocio Esperanto Nederland, ricevis 60 inform-petojn en la unuaj 10 monatoj de 1999; en novembro kaj decembro kune jam 88 petojn. La kresko estas atribuebla al poŝt-

SLOVAKIO: Natura Esperanto

En januaro la slovakia televido dufoje montris filmon pri Litovio, precipe pri ties naturparkoj, faritan helpe de la e-istoj Marián Šturcel kaj Milan Zvara. Kelkaj enkondukaj frazoj sonis en Esperanto. (*Esperantisto Slovaka*)

fariĝu patrono de TEJO

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- *TEJO tutmonde* (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikajojn.

Oficiala informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Aŭstralio: Rosalie Schultz. Germanio: Margarete Bettmann; Wolfgang Schwanzer. Japanio: Reza Kheir-Khah. Usono: Philip Dorcas; Derek Roff.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

Subtenantoj (min. \$25): Meksiko: Julie L. Regal. Usono: Antonio Gomez; R. Paul Lynch; Ronald J. Glossop.

Amikoj (min. \$10): Japanio: Anna M. Steffes. Usono: Alex Tate; Charlene Baker; Pamela Lieber; Sally Lawton; Steven E. Sorenson.

PATRONOJ DE TEJO 2000

Argentino: Atilio Orellana Rojas. Finnlando: Päivi Saarinen. Francio: Henri Roy; Daniel Maynaud; Hervé Mougin; Raymond Despujols. Hispanio: Francisco Belmonte Sánchez. Italio: Lidia Neri Lami. Kanado: Brian D. Kaneen. Nederlando: Miny Massar-v. Diepen. Usono: D. Gary Grady; R. Paul Lynch; L. A. Walther; Ronald J. Glossop.

SOCIETO ZAMENHOF 2000

Aŭstralio: Keppel E. Enderby; Nassif Isaac; Ralph Harry; Teresa M. Metherall. Belgio: Jos Vandebergh.

Brazilo: Marija Pozder Almada; Álvaro Rabêlo. Britio: E. R. Waterworth; Sybil V. Sly. Finnlando: Raita Pyhälä. Francio: Henri Roy; Jeanne Roy; Tadeusz Nowak. Germanio: Eva Bork; Elfriede Kruse; Elfriede Blasius; Helga Erhard. Italio: Clara Gubbioli Carioli; Maria Teresa Malatesta; Lidia Neri Lami. Japanio: Akira Morita; Wilhelm Schmid; SATOO Ōoiĉi; YAMASAKI Seikō. Kanado: Brian D. Kaneen. Meksiko: Julie L. Regal. Nederlando: P. H. Damsté; Wiebren Akkerman; Miny Massar-v. Diepen. Svedio: K. G. Lennart Lagerkrantz. Usono: Arnold Victor; Bruce Arne Sherwood; Doris Vallon-Wheeler; D. Gary Grady; Thomas H. Goodman; Humphrey Tonkin; Margaret L. Barkley; Milton O. Brown.

DONACIOJ 2000 (EUR)

ĝis la 29-a de februaro

Fondaĵo Afriko: Italio: D. Trombetta 1040,00. Nederlando: R. Slot 90,76. Svedio: J. Hammarberg 11,55. *Sumo ĉi-jara* 1232,14.

Fondaĵo Ameriko: Belgio: F. Witdoeck 100,00. Brazilo: J. Gonçalves de Lima 50,00; C. M. Lemos 100,00. Finnlando: R. Pyhälä 84,00. Germanio: C. Altrogge 35,79. Nederlando: C. Bossong-Singer 45,38. Svedio: J. Hammarberg 11,55.

Venezuelo: J. E. Bachrich 101,59; Venezuela E-Asocio 32,51. *Sumo ĉi-jara*: 560,82.

Fondaĵo Azio: Japanio: Y. Akada 183,32; K. Hayasi 17,42; Y. Hori 18,39; N. Inaba 18,40; M. Isaki 36,80; M. Isino 27,60; T. Kaba 18,33; I. Katou 18,33; K. Kazawa 18,40; T. Kobayasi 18,33; S. Minaba 18,40; Y. Miwa 1833,18; I. Miyamoto 18,86; E. Miyosi 92,00; T. Nakamiti 36,80; M. Nisida 18,34; N. Nisimura 18,40; S. Oonisi 18,40; S. Satou 36,66; T. Uehara 18,33; S. Yamasaki 18,33; Y. Yamasaki 18,33. *Sumo ĉi-jara*: 2861,08.

Fondaĵo Canuto: Italio: V. Madella 2,00; L. Oberrauch 2,00. Nederlando: W. C. Keizer 22,69. *Sumo ĉi-jara*: 569,30.

Fondaĵo Wüster: Belgio: G. Pirlot 49,55. Germanio: K. Blanke 102,26; W. Blanke 107,37. Nederlando: Konversacia Grupo Nijmegen 90,76. *Sumo ĉi-jara*: 349,94.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Germanio: U. Fahrion 17,90. Italio: V. Madella 2,00; L. Oberrauch 2,00. Pollando: N. Dube 9,50. *Sumo ĉi-jara*: 231,40.

Volontula Fondaĵo: Norvegio: E. Matland 12,38. *Sumo ĉi-jara*: 259,66.

Kampanjo 2000: Nederlando: J. Vries van Leeuwen 28,58. *Sumo ĉi-jara*: 28,58.

Ĝenerala Kaso: anonime 0,23. Nederlando: R. Moerbeek 45,38; F. D. van Zoest 11,35. Portugalio: W. Oeste 12,47. *Sumo ĉi-jara*: 613,34.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



Drezen en la ĉina

La prestiĝa Shangwu eldonis en 1999 la monografion *Historio de la Mondolingvo* (1928) de Ernest Drezen, en traduko de Xu Mo, esperantisto torture mortigita dum la t.n. Kultura Revolucio. Antaŭparolojn verkis Hu Sheng kaj CHEN Yuan. (U. Lins)

Eseoj suplemente

En *Sennacieca Revuo*, jara suplemento al *Sennaciulo* (red.



Michael Scherm), i.a. legeblas la eseo "Eŭropa ideologio" de Zlatko Tišljarić kaj "Kiel Esperanto servas la Komunistan Movadon en antaŭmilita Japanio" de Kurisu Kei.

MONTAGUT: Dulingva enigmo

Katalunlingva romano de Abel Montagut, *L'enigma de l'aranya*, aperis en februaro ĉe la eldonejo Pagès. (La sama republikigis, kun novaj formato kaj kovrilo, *La gesta d'Utnoa*, katalunan version de *Poemo de Utnoa*). Antaŭvideblas apero de *La enigmo de l' aranejo* ankaŭ en Esperanto. TTT-paĝo, provizore nur katalune: <http://www.stel.net/aranya>.

Elita cento

La legantoj de *Literatura Foiro*, *Heroldo* kaj *La Ondo de Esperanto* estas invitataj sendi, ĝis 10 julio al LF (p. k. 26, BG-3000 Vraca, Bulgario; lofo@usa.net), nomojn proponatajn por la libro *La cent plej eminentaj esperantistoj de la 20a jarcento*, aperonta ĉe LF-koop. (*Heroldo*)

Pensea cento

Penseo, "monata beletra revueto" (vidu marto, p. 47) festis sian 100-numerigon en febru-

VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM MALFERMA TAGO

sabaton la 13-an de majo 2000 (10h00 - 17h00)



- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Bazaro de e-aĵoj


Speciala gasto:
GIAN CARLO
FIGHERA



- ★ Senpaga loterio
- ★ Senhalta prezentado de E-filmoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

aro. Ĝi estis, en 1997, la unua rete legebla

Esperanto-periodaĵo el Ĉinio (<http://www.crosswinds.net/~xfmao/penseo>). Ĉefredaktoro SHI Chengtai anoncas "novan aspekton" ekde numero 101.



Laste aperis

☞ (daŭrigo de p. 75)

Plansprache und Phraseologie. *Empirische Untersuchungen zu reproduziertem Sprachmaterial im Esperanto.* Sabine Fiedler (1957). Frankfurt am Main: Peter Lang, 1999. 444p. ISBN 3 631 34088 5. 21cm. Germanlingva. Pri la ekesto kaj evoluo de frazeologio en planlingvo, kompare al etnaj lingvoj. (Vidu recenzon sur p. 74.) € 78,00.

Simplomoj. Gonçalves Neves (1964). Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1999. 72p. ISBN 90 71205 86 X. 21cm. La unua "originala poemaro senprefaca" de la aŭtoro. € 7,80.

Trarigardo kaj mallonga priskribo de la kulturhistoriaj monumentoj sur la teritorio de komunumo Prilep. Ilija Velkoski. Trad. Nikola Uzunov. Prilep: Instituto por Protekto de Kulturmonumentoj, 1996. 64p. 24cm. Ilus. Dulingva: E-makedona. € 16,50.

Valdemar Langlet — en glömd hjälte? Agneta Emanuelsson. [Kätrineholm:] Västra Sörmlands Kultur- & Guideförening, 1999. 19p. 30cm. Ilus. Svedlingva. "Ĉu forgesita

heroo?" Vivresumo de pionira sveda esperantisto, kiu en 1944 savis milojn da persekutitaj judoj en Budapeŝto. € 7,50.

Verda signalo. De la spirito Andreo Ludoviko. Francisco Cândido Xavier. El la portugala trad. Allan Kardec Afonso Costa. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, 2000. 110p. 18cm. Instruoj por "sekure paŝi sur la vojo de la vivo". € 7,80.

Work of the Universal Esperanto Association for a more peaceful world, The. Ulrich Lins (1943). Rotterdam: UEA, 2000. 12p. 22cm. Esperanto Document 45A. Angla traduko de *Laboro de Universala Esperanto-Asocio por pli paca mondo*. € 2,15. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

GLUMARKOJ

Honkonga IJK. Rotterdam: TEJO, 2000. 14 plenkoloraj glumarkoj de 7 diversaj tipoj sur unu folio. Po € 1,00 por folio. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

KOMPAKTAJ DISKOJ

Herooj kaj martiroj. Valsiginto [Max

Wearing. Adelajdo: Valsiginto, 1999.] 55 min. "Popolkultura ekvideto" de Aŭstralio en la jaroj 1890-aj, en radiodrameca prezento proza kaj muzika. Erojn el *Aŭstralio antologio* kaj *Aŭstralio kantas sian historion* trad. Faye Koppel, Ken Linton k. a. € 12,90.

Kia viv'. Kore. Donnevill: Vinilkosmo, 2000. 29 min. Kolekto 2000, n-ro 9. Sep kantoj de franca varietea "rok-gruva" bando, pri ĉiutagaj vivproblemoj. € 15,00.

Leclercq. [Toulouse:] Stansy Productions [1997]. 20 min. Kosmopolita rokmuziko de kantisto konata el la disko *JoMo kaj liberecoj* (1998). 1 kanto en Esperanto, 5 plejparte en la franca. € 12,00.

Lingvo intermonda. Dolcexamar. Donnevill: Vinilkosmo, 2000. 32 min. Kolekto 2000, n-ro 10 (lasta). Finna-brita bando muzikas rande de repo, hiphopo kaj "ekstertera tekno-roko". € 15,00.

Qexteto Esperanto. Kvarteto/Qexteto Esperanto, 1999. 35 min. Kun bukedo da desegnaĵoj. Naŭ slovakaj popolkantoj en rokmuzika interpreto, ĉiu kantata kaj Esperante kaj slovake. (Vidu jan., p. 5.) € 16,50.

Maria ANGELOVA (1925-1999), aŭtorino de la poemaro *Kien ni iras* (1991), mortis la 12-an de decembro en Sofio (Bulgario).

Géo (Georges) JUNIER (1913-2000), e-isto ekde 1932, UEA-membro 55 jarojn, loka delegito, instruanto, forpasis la 17-an de februaro en Gray (Francio). Lia vivo-verko estis la deksalona Nacia Esperanto-Muzeo en Gray, kiun li kreis, gvidis kaj daŭre riĉigis. Pro sia Esperanta agado li ricevis plurajn nemovadajn distingojn.



Arkivo de UEA

Jan STRÖNNE (1912-2000), Honora Membro de UEA ekde 1991, forpasis la 7-an de marto en Malmö (Svedio).

Jan Strönné naskiĝis la 6-an de januaro 1912. Profesie bankoficisto, li lernis Esperanton en 1932, gvidante tuj post sia propra komenca kurso ties daŭrigon. (Poste, ĝis la 90-aj jaroj, li instruis en pli ol 60 diversnivelaĵoj E-kursoj.) Li baldaŭ iĝis prezidanto de la E-societo de Malmö (1935-51 kaj 1974-80). Ekde 1938 li kunaranĝis danajn-svedajn E-tagojn, kiuj plu okazadis ankaŭ dum milito, alterne en la du landoj. En 1943 li aranĝis Someran Universitaton kaj aperigis la libron *50 jarojn kun Paul Nylén*.



Arkivo de UEA

Modesto GIULIANI (1914-2000), delegito en Ucacha (Argentino), mortis lastatempe.

Egon GÖRANSSON (1927-1999), sveda laborista E-aktivulo, jardekojn redaktoro de *SLEA-Infomilo*, forpasis la 12-an de decembro en Malmö.

Hanny LIECHTI, plur-jardeka aktivulino, estrarano kaj honora membro de E-Societo Zuriko, forpasis la 5-an de decembro, 85-jara. Ŝi agadis ankaŭ en Svisa E-Societo kaj Kristana E-Ligo Internacia.

Renato LISI (1939-1999), kvar jardekojn esperantisto kaj delegito en Acquaviva (Siena, Italio), forpasis fine de la pasinta jaro.

En 1948 Strönné funkciis kiel LKK-prezidanto de la 33-a UK en Malmö. Ses fojojn li organizis, inter 1953 kaj 1972, signifajn prelegsemajnojn en Frostavallen, kie lanĉiĝis en 1956 la informada "Principaro de Frostavallen". En 1948 li iĝis prezidanto de Sveda E-Federacio por ne malpli ol 30 jaroj, kaj honora SEF-prezidanto en 1978. Sub lia gvido, SEF donis modelan kontribuon al UEA, i.a. pri la peticio al UN en 1965, kaj estis la unua ricevanto de Trofeo Fyne pro landa agado en 1978.

UEA-membro ekde 1937, Strönné servis tri jardekojn kiel komitatano (1951-80) kaj 55 jarojn kiel delegito (ĉefe pri informado).



Komplezo de María Menéndez Díaz

Nicolás MUÑOZ ALONSO (1917-1999), delegito, fondinto (1987) kaj prezidanto de la grupo Antaŭen en Avilés (Hispanio), forpasis la 19-an de decembro, en la tago de la loka Zamenhof-solenaĵo.

Roelof SLOT (1904-2000), dumviva membro, mecenato, pli ol 70 jarojn esperantisto, mortis la 2-an de marto en Zeist (Nederlando), kie li estis longtempe delegito kaj prezidis la lokan E-rondon pli ol 40 jarojn.

Jack SNARBERG (1921-2000), fakdelegito pri juveloj, UEA-membro preskaŭ 60 jarojn, forpasis la 17-an de januaro en Jönköping (Svedio).

Kazimierz SZCZUREK (1925-2000) mortis la 28-an de januaro en Cieszyn (Pollando), kie li antaŭe estis delegito pri bibliologio kaj bibliotekoj. Publicisto pollingva, de 1960 li verkis ankaŭ en Esperanto. Szczurek aperigis i.a. la poemarojn *Nuancoj* (kun Lina Gabrielli, 1980) kaj *Sopiro al puraj fontoj* (1994), skizojn (*Homoj, verkoj, ideoj*, 1990) kaj "vivhistorietojn" (*Rakontoj ĉe kandela flamo*, 1997).

Zdravko VELIKOV (1929-1999), antaŭa vicdelegito en Pleven (Bulgario), mortis la 27-an de novembro. Dum multaj jaroj li aktivis en la loka Esperanto-societo kaj en la estraro de Bulgara Esperanto-Asocio, i.a. prezidante ĝin dum kelkaj monatoj en 1993. En la sama jaro li kunfondis, kiel ties estrarano, la kulturan Fondaĵon "Socio kaj Esperanto".

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ☐ kenderby@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ☐ corsetti@iteldad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ☐ lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ☐ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17; ☐ esp.togo@cafe.tg.


Estrarano (kulturo, landa agado): s-ro Tacuo Huĝimoto, Kubota 31, Sakio-ku, Kyōto, 606-8266, Japanio; ☎ +81-75-711-45-58; ☐ jasu-k@mac.email.ne.jp.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ☐ kalle@esperanto.se.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KŜIARTO estas gazeto
por ĉiu kiu serĉas interesan
legaĵon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
KŜIARTO estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 2000 **KŜIARTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFA 2000

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	39,67 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	36 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	740 frankoj	Hispanio	2600 pesetoj	Pollando	9 eŭroj
Brazilio	9 eŭroj	Israelo	14 eŭroj	Portugallio	2900 eskudoj
Britio	13 eŭroj	Italio	36000 lirej	Svedio	165 kronoj
Danio	135 kronoj	Japanio	2300 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	110 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	20 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

Unika Kursaro Serĉas Instruistojn

La monde konata Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (<http://esperanto.org/nask/>) pasintjare festis sian 30-an jaron ĉe Sanfranciska Ŝtata Universitato.

Ĉiujare, dum tri semajnoj en junio-julio, la Kursaron partoprenas studentoj el tuta Nord-Ameriko kaj aliaj landoj tra la mondo, en kvar niveloj ekde komencanta ĝis spertula. Tri instruistoj dividas la instrulaboron kaj interkonsentas pri metodologio, kursmaterialoj k.s. La salajro estas proksimume \$3500 depende de kvalifikoj.

La gvid-komitato pri la kursaro invitas sinproponojn de spertaj instruistoj por instrui en iu venonta jaro. Ĉiujare la komitato komunikas siajn rekomendojn al la universitato, kiu respondecas pri la fina decido. Kandidatoj devas kapabli instrui kompetente je ĉiuj kvar niveloj.

Scio de la angla lingvo ne necesas, sed regado de pluraj lingvoj estas bonvena. Sendu leteron pri via instru-biografio kaj antaŭvidata kontribuo al la kursaro, resumon de viaj edukaj, profesiaj kaj movadaj spertoj, kaj du aŭ tri rekomendleterojn al:

Ellen M. Eddy, Administranto, Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, 11736 Scott Creek Drive, Olympia WA 98512, Usono; ☎ (360) 786-9175, ✉ eddyellen@aol.com.

TRI BONAJ NOVAĴOJ PRI SERBOJ!

Antologio de la serba parola literaturo. Red. Ž. Ivanović. Beograd, 1991. 345p. Impona kolekto de poemoj, rakontoj, proverboj. Prezo: € 12,00.

Antologio de la serba poezio (1200-2000). Red. S. Arandelović. Beograd, 1998. 499p. Bindita. Okcent jaroj da riĉa poezia vivo. Prezo: € 27,00.

Al la mondo donace. Antologio de la serba porinfana poezio. Red. Z. Martinov. Beograd 1996. 160p. Dulingva. Premiita kiel "Infanlibro de la jaro". Prezo: € 7,50.

Triona rabato ekde 3 ekzempleroj (eĉ diversaj). Mendu ĉe UEA.

SPECIALA OFERTO
ĜIS LA FINO DE MAJO 2000

binditaj jarkolektoj de la revuo

ESPERANTO

1966	€ 6,80	1991	€ 16,35
1979	€ 14,95	1992	€ 16,35
1980	€ 16,35	1993	€ 23,15
1982	€ 16,35	1994	€ 23,15
1985	€ 16,35	1995	€ 23,15
1986	€ 16,35	1996	€ 23,15
1987	€ 16,35	1997	€ 23,15
1988	€ 16,35	1998	€ 23,15
1990	€ 16,35	1999	€ 23,15

Triona rabato se vi mendas tri aŭ pli da jarkolektoj.

Al la prezoj aldoniĝas 10% por afranko (minimуме € 2,25) kaj (en EU) 6% por imposto.

Renkontiĝo por ĉiuj fakaj aplikantoj de E-o kaj E-terminologioj:

KAEST 2000

Prago (CZ) 2000-11-10/12, sub aŭspicioj de UEA

Ĉeftemo (Sekcio A): Ekonomio sojle al la tria jarmilo. Tradiciaj temoj (Sekcio B): Terminologiaj problemoj de aplikoj de Esperanto en scienco kaj tekniko; (Sekcio C): Scienco kaj tekniko ĝenerale.

Arangas: Ĉeĥa E-Asocio, kunlabore kun la kongresa agentejo KAVA-PECH, kiel parton de Kampanjo 2000.

Pliaj informoj kaj aliĝoj: KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-252 29 Dobříchovice, Ĉeĥio; ☎ +420/2/991-22-01; ✉ +420/2/991-21-26; ✉ kaest@kava-pech.cz.

Haveblas la prelegkolekto de KAEST '98, Modernaj rimedoj de komunikado (vidu p. 75).



SALUTU DRAKE!



**AMUZAJ GLUMARKOJ DE
LA 56^a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO
EN HONKONGO.**



14 plenkoloraj glumarkoj de
7 diversaj tipoj sur unu folio.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA:
po € 1,00 por unu folio.
Triona rabato ekde tri folioj.



RESPONDOJ PRI RASISMO

"Infano estas
scivolema. Ĝi faras
multajn demandojn kaj
ĝi atendas precizajn
kaj konvinkajn
respondojn. Per ĉi tiu
libro mi provas
 respondi la demandojn
de mia filino. Ĝi celas
la infanojn kiuj
 ankoraŭ ne havas
 antaŭjuĝojn kaj volas
 kompreni. Pri la
 plenkreskuloj, kiuj ĝin
 legos, mi esperas ke ĝi
 helpos ilin respondi la
 demandojn, pli emba-
 rasajn ol ni kredas, de



siaj propraj infanoj." (Tahar Ben Jelloun)
Tiu ĉi libro de la Marok-devena aŭtoro enorme
furoris en Francio. En 1987 Tahar Ben Jelloun
gajnis la prestiĝan Premion Goncourt.

PAĈJO, KIO ESTAS RASISMO? Tahar Ben Jelloun (1944). El la
franca trad. Armela LeQuint kaj Ĵak Le Puil. Rotterdam: UEA,
1999. 52p. ISBN 92 9017 063 8. 19cm. Prezo: € 6,50.

KEF 2000

17.-23.7.2000 en Helsinko, Finnlando

SPICAJ PRELEGOJ

- Sciencfikcio
- E-muziko
- Recenzarto:
- Anatemi
- aŭ ameni?
- Kio, diable,
- estas poezio?
- Rokliriko



VIGLAJ DEBATOJ

- Ĉu ni kulturu
- nur nin mem:
- 20 jaroj post
- Raŭmo kun
- Jouko Lindstedt.
- Ĉu esperanta
- folkloro?
- Literaturaj vortoj

DANCO

- Tutvespera plene
- esperanta diskejo
- Dancspektaklo de
- Kim Henriksen

KONCERTOJ

- Dolcxamar,
- Esperanto Desperado,
- Ĵomart kaj Nataŝa,
- Persone,
- Stomakoj
- Surprizaj fantomoj
- de la pasintec'...

KURSOJ POR KREEMULOJ

- amatora teatro
- verkateliero
- kantemula rondo
- komiksdesegnado
- beletra diskutejo

INFANOJ

- Aparta programo
- Infanvartado

NE ENUU! VENU KEFEN!



Pliaj informoj:
www.esperanto.fi/kef2000.html

aŭ
Kultura Esperanto Festivalo
Siltasaarenkatu 15 C 65
FI-00530 Helsinki, Finnlando

Kongreso sur via koverto

Ideala ornamaĵo por viaj
leteroj en la monatoj an-
taŭ Tel-Avivo, la kongresa
glumarko estas mendebla
ĉe la Libroservo de UEA:
po € 1,35 por 1 folio de 15.
Triona rabato ekde 3 folioj.



Marília BRAZILIO 1978

San Luís ARGENTINO 1980

San José KOSTARIKO 1996

Bogotá KOLOMBIO 1999

nun... al MEKSIKO 2001

De la 15-a ĝis la 21-a de aprilo

Meksika Esperanto-Federacio
Apartado Postal M 10576 06000 México, D.F. Meksiko
Tel. +(5) 7 62 42 28.
Retpoŝtaj adresoj: mef@punto-y-aparte.com
gelaar@data.net.mx

ANTICIPU VIAJN ALIĜOJN.
SPECIALAJ RABATOJ!

OFICIALA AERLINIO **MEXICANA**



5^a Tut-
Amerika
Kongreso de
Esperanto